

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



Editor: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.

Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

N-ro 14 (94)

MELBOURNE

Jan. - Mar., 1960

GAJA KONGRESO EN RAVA HOBARTO

La 12-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso okazis inter la 3-a kaj 9-a de Januaro 1960 en la Tasmania ĉefurbo.

Bonega organizado, varia distrado, viglaj kunsidoj, nova Statuto, nova Libroperanto, nova Prezidanto — jen elstaraj de la Hobarta Kongreso.

Speciale benataj per ĉarma ĉefurbo sur kaj ĉirkaŭata de montoj, apud larĝa rivero blue briletanta kaj haveno mirinde bela, la Hobartanoj estis plue dorlotataj de la vetero, kiu blue kaj brile ridetis dum la tuta Kongressemajno — nur eble iom tro brile dum la lastaj du-tri tagoj. Kun ĉi tiuj benaĵoj kombiniĝis feliĉa avantaĝo — ĉeesto de lernejestro, kies simpatio pri nia afero ebligis, ne nur disponigon de ties lernejo kiel Kongresejo, sed ankaŭ tre oportunan anoncon pri enkonduko de Esperanto en la lernejan studprogramon. Tio kompreneble konsistigis traŝan informon por la ĵurnaloj kaj donis bonan instigon al la Kongresa laboro. Do jam estis multe por komenco, sed la lokaj Esperantistoj tamen aldonis bonegan kunlaboradon por okazigi Kongreson plene sukcesan kaj vere esperigan por la estonteco.

Jam tagojn antaŭ ol la Kongreso oficiale malfermiĝis, komenciĝis en Hobarto alvenoj de ĉeflandaj vizitantoj. Aere kaj ŝipe ili veturis Tasmanion, kaj multaj poste veturis pluen de nordo al sudo per trajno, aŭtobuso kaj eĉ per "motor scooter". Do, kiam okazis dimanĉon (3/1) posttagmeze bonveniga kunveno, ĉeestis preskaŭ ĉiuj.

Aliĝis al la kongreso 74 gesamideanoj, el kiuj 58 fakte partoprenis. Krom Okcidenta Aŭstralio, ĉiuj ŝtatoj kaj Canbera estis reprezentataj.

La Kongresejo troviĝis en bela halo de la Kvakera Lernejo por pli junaj infanoj kaj enirejon oni ekvidis inter amasoj da belaj floroj tie kreskantaj. Interne, dum la ĉeestantaro pli kaj pli nombriĝis, pli kaj pli laŭtigis la gaja babilado. Okazis multaj kortuŝaj salutoj inter malnovaj amikoj kaj jam oni eksentis starigon de novaj amikecoj.

Bonvenigis la kongresanojn la loka Prezidanto, s-ano Marcel Leereveld, el kies nelacigebla entuziasmo rezultis ĉi-tiu bela kongreso. Poste ĉiuj unuigis en komuna kantado.

Sekvis vere luksa refreŝiga festeto, kiun provizis la lokaj samideaninoj. Ĉi tiuj ŝajne konkursis unu kun alia por prezenti la plej bonaspektajn kaj bongustajn frandaĵojn kaj tenti eĉ dikulinojn al malsaĝeco.

Ĉeestis jam ĉi tiun kunvenon ankaŭ ĵurnalistoj, kiuj rigardis ekspozicion, aŭskultis paroladojn, intervjuis vizitantojn kaj poste aperigis artikolon kaj bildon en la tagĵurnalo de Hobarto. La propagando per la preso kaj radio certe estis unu el la plej sukcesaj trajtoj de la 12a Kongreso. Jam antaŭe en Launceston kaj en Hobarto aperis artikoloj kaj disaŭdiĝis aludoj pri la Kongreso kaj pri Esperanto. Dum la Kongreso okazis

3 radio-intervuoj, kaj ĉiutage en la ĵurnalo "Mercury" aperis ne nur unu sed plej ofte kelkaj artikoloj kaj bildoj.

Dimanĉon vespere, Kongresanoj ĝuis sperton novan en Aŭstralio: teatraĵeton en kiu ĉiuj ludantoj estis infanoj. "La Tempo-Maŝino", kiun reĝisoris S-ro Lancaster el Hobarto, estis interesa kaj amuza skizo, en kiu du knabinoj renkontis en sonĝo profesoran inventiston, kaj dum ties portempa foresto funkciigis lian maŝinon por alvenigi personojn el la pasinteco kaj estonteco, sed poste ne sciis kiel resendi la kolerigantajn vizitantojn el la historio kaj spaco. Ludis la rolojn lernantoj ĉe la Kvakera Lernejo, kiuj studis nian lingvon dum la pasinta jaro en la libera tempo. Naturaj kaj tre lertaj geaktoroj ili estis. Kiel duan parton de la programo, S-ro J. Matasin (Sidnejo) montris belajn kolorkliŝojn kaj interese parolis pri "Vojaĝo trans Amerikon" kaj renkontiĝoj kun tieaj Esperantistoj.

La Malfermo

London matene en bela sunbrila vetero, okazis la solena malfermo de la Kongreso. Kiel Prezidanto de la Hobarta Grupo, S-ro M. Leereveld bonvenigis vizitantojn. Per dumminuta silento la Kongresano honoris samideanojn mortintajn dum la lastaj 2 jaroj, kaj memorigis ilin laŭnome S-ro H. Koppel. Oficiale malfermis la Kongreson S-ro Ralph Harry, Komisiito por Zamenhof-Jaro, kiu skizis la laboron elfaritan dum Zamenhof-Jaro kaj esprimis esperojn pri estonta agado. Dume, ĵurnalisto faris notojn pere de traduko de S-ro Leereveld, kaj poste aperigis raporton en la ĵurnalo. Sekvis legado de salutoj transmaraj kaj enlandaj, kaj salutis la kongreson la reprezentantoj de la diversaj aŭstraliaj Esperanto-kluboj. Fine aŭdiĝis "La Espero", kaj antaŭ ol disigi ĉiuj amasiĝis ekstere sur la ŝtuparo por fotografado.

Akcepto ĉe la Urbestro

Afero kiu aldonis dignon al la Kongresaj aranĝoj kaj kontribuis multe, kompreneble, al la reklamo en la ĵurnalo, estis Akcepto de lia Moŝto la Urbestro de Hobart, Alderman Osbourne. Sekvante la ekzemplon de la Kongreso en Perto, Hobartanoj klopodis kaj bone sukcesis aranĝi ĉi-tiun agrablan ceremonion. Je la 3.30-a posttagmeze, post la Malfermo, la

Kongresanoj amase eniris la Urbdomon por prezentiĝi al lia Moŝto, kiu atendis kune kun sia edzino. Post formala prezentado la moŝtaj gastigantoj intermiksiĝis kaj interparolis kun siaj gastoj, dum ĉi-tiuj bone kaj elegante regalis sin helpe de funkcioj. Je la 4-a Lia Moŝto kune kun kelkaj ĝentilaj pri Esperanto formale bonvenigis ĉiujn. S-ro R. Harry, respondante en la nomo de la vizitantoj, rememorigis ke jam ofte Tasmanio faris la unuan antaŭan paŝon en la edukada fako kaj ke nun, li esperas, la enkonduko de Esperanto en la Kvakeran studprogramon komencas alian. S-ro Nightingale, respondante en la nomo de Hobartanoj menciis la helpon kiun li ricevis transmare per de Esperanto kaj kaptis la okazon por publike gratuli lian Moŝton pri jusa enoficiĝo kiel Urbestro.

LABOR - KUNSIDOJ

Okazis 5 A.E.A.-kunvenoj kaj po unu U.E.A. kaj S.A.T. kunsidoj. Pro ne-ĉeesto de D-ro Fred Williams, la ĝisnuna A.E.A.-Prezidanto, malfermis la Generalan Kunvenon de A.E.A. Vic-Prezidanto M. Leereveld, kiu proponis ke D-ro Ross Robbins (Canberra) transprenu la gvidadon de la kunvenoj. Jam nun ni devas diri, ke D-ro Robbins majstre plenumis ĉi tiun taskon, dank' al kio glate plenumiĝis la longaj tagordoj.

La A.E.A. Sekretario (S-ro H. Koppel) donis detalan raporton pri la agado de A.E.A. dum 1958/59. Li atentigis, ke li jam dum 10 jaroj plenumas la laborplanan sekretarian postenon, kaj ke nun estu la plej bona okazo elekti alian samideanon.

Modelan kasraporton prezentis S-ro Ken Linton, kiu montris ke la financioj de A.E.A. estas sanaj, sed ke ni bezonos pli da anoj por aperi pli ofte nian gazeton.


S-ro R. Harry prezentis majstran raporton pri sia multflanka agado kiel Komisiito por la Zamenhof-Jubilea Jaro. Resumo de lia raporto aperos en venonta numero de nia gazeto, sed la fakto ke kolektiĝis preskaŭ £800 por la Zamenhofa Fonduso, inter granda anaro, parolis por si mem.

La diskutado pri la nova statuto de A.E.A. okupis kelkajn kunsidojn. Krome, ekster la kunsidoj, frumatene

kaj malfruvespere en la hotelo kaj dum la manĝoj, s-roj Gueltling, Harry, Linton kaj Fridenbergs kaj D-ro Robbins pridiskutis la diversajn paragrafojn, tiel glatigante jam antaŭe malfacilaĵojn kaj evitante tro longajn diskutojn dum la kunsidoj. La nova statuto fine akceptita de la delegitaro aperas kiel suplemento al ĉi-tiu numero.

Pri la Libro-Servo s-ro Linton raportis, ke li ricevis avizon de la Cefperanto, s-ano A. Grant (Brisbane), ke tiu devas bedaŭrinde rezigni de tiu posteno, ĉar li prepariĝas por gravaj ekzamenoj kaj tial ne disponas al li la necesa tempo. La Kongreso akceptis bedaŭre la demision de s-ro Grant kaj esprimis esperon, ke li almenaŭ restu kiel libroperanto por Kvinlando. Kiel nova Cefperanto de la Libro-Servo elektigis s-ino I. Milligan (274 Mont Albert Road, Surrey Hills, Vic.), al kiu oni sendu ĉiujn libro-mendojn.

Pri la redaktado de "Australian Esperantist", s-ro R. Harry esprimis deziron, ke oni aranĝu aerpoŝtan ricevon de gravaj raportoj (ekzemple pri Universalaj Kongresoj). Akceptita estas ankaŭ la propono ke estonte aperu regule en "Australian Esperantist" ĉiuj financ-raportoj de A.E.A., de la Libro-Servo kaj de A. E. Kongresoj.



S-ro F. Mueller-Sorau (Sydney).
Peranto de la nova servo por
Sombendoj kaj Bibliografio.

Laŭ propono de s-ro Harry kreigis nova A.E.A.-servo, kiu provizas sombendojn kaj kompilas bibliografiajn listojn de libroj en la posedo de Aŭstraliaj Esperanto-societoj. Kiel Peranto elektigis s-ano Fritz Mueller-Sorau (Sydney).

Longa diskuto okazis pri la uzo de la Zamenhof-fonduso. Kvankam la kolektita sumo de preskaŭ £800 estas vera sukceso, ĝi tamen ne sufiĉas por krei Esperanto-domon. Pro tio s-ro Harry proponis la daŭrigon de la Fonduso. Tri Kuratoroj estis elektitaj por leĝe administri kaj eble investi la kolektitan monon. Tiuj kuratoroj estas:

S-ro R. Harry (Canberra), S-ro K. Linton (Melbourne) kaj S-ro J. Matasin (Sydney).

La fina decido estis "ke la kuratoroj konservu almenaŭ 90% de la fonduso por Esperanto-Domoj kaj rajtu eluzi ĝis 10% por ĝeneralaj celoj de A.E.A."

La elekto de la nova estraro okazis jam laŭ la nova statuto, laŭ kiu ĉiu kongresano rajtas voĉdoni.

La ĝisnuna Prezidanto, D-ro F. Williams, skribe petis ke oni ne reelektu lin kiel prezidanton.

Voĉdonade rezultis la sekvonta Estraro: Prezidanto: S-ro R. Harry (Canberra); Vic-Prezidantoj: D-ro F. Williams (Melbourne); S-ro S. L. Parry (Brisbane); Sekretario: S-ro H. Koppel (Melbourne); Kasisto: S-ro K. Linton (Melbourne).

La Esperanto-societoj en Perth, Hobart kaj Sydney rajtas nomi po unu estrarano por kompletigi la estraron.

Bedaŭrinde niaj lokaj grupoj tro timas la malfacilaĵojn aranĝi kongreson, pro kio neniu invitis la venontan. Nur post diskuto decidiĝis ke CANBERRA esploru la eblecon aranĝi la 13-an kongreson en Januaro 1962, sed se tio ne efektiviĝos Sydney provos ĝin aranĝi.

Pri la prepar-laboroj por la "AUS-TRALIA ANTOLOGIO" S-ro Linton raportis kontentigan progreson dank' al la aktiva kunlaboro de s-ro Banham, D-ro Caldera kaj S-ro Schwerin.

Mallongan U.E.A.-kunvenon prezidis la ĉefdelegito S-ro Linton. Ankaŭ la S.A.T.-kunveno estis tre mallonga. Ĝin prezidis S-ro V. Gueltling.

S-ano M. Leereveld donis agadraporton kaj estis poste reelektita kiel landa peranto.

Ekskursoj

La Kongres-programo inkluzivis du interesajn aŭtobusekskursojn.

La unua, kiu okazis merkredon posttagmeze (6/1), estis al vidindaĵoj de Hobarto, kaj kondukis la partoprenantojn unue al la Haveno por ekvido de la dokoj. Poste oni rondveturis "Domain" monteton por kelkaj belaj panoramoj de la urbo kaj rivero Derwent, kaj daŭrigis al Sandy Bay, ŝatata marbordejo, kie, sur eta altaĵo apud la Haveno, troviĝas "West Point" Hotelo, interesa konstruaĵo en formo de granda blanka vaporŝipo. La klimakso de ĉi tiu ekskurso estis senspiriga grimpeturo al la supro de Monto Wellington (pli ol 4,000 futojn super la marnivelo), de kie oni ĝuis kvazaŭ birdo mirindan kolorplenan vidajon. Malproksime malgrande etendiĝis malsupre la blua haveno, kun siaj ondetoj, multaj golfetoj kaj arĝentaj strandoj; serpentumis la bela rivero, kun klare distingebla la longa flosponto; kaj ĉie ĉirkaŭe elstaris la verdaj montoj, dum, apud la marbordoj, sur la deklivoj kaj en la valoj vidiĝis la domaroj kiuj konsistigas la urbon. Rigardante, oni estis vere senvorta.

La dua estis tuttaga kaj okazis sabaton (9/1) post la oficiala malfermo de la Kongreso. En bela sunbrilado la kongresanoj veturis pli ol 100 mejlojn (entute) por viziti al historia Port Arthur, loko de la unua Tasmania kolonio. Pro ĝia situo ĉe la plej suda pinto de mallarĝa duoninsulo, kun kiu ĝi unuigas nur per ege mallarĝa terkolo, la loko estas natura malliberejo, kie en la komenco oni lokigis punlaboristojn. Troviĝas tie multaj interesaj pri la frua historio de Tasmania—muzeo, malliberejo, ktp.—kiun la vizitantoj inspektis, helpate de gvidanto. Post lunĉo ili denove eniris la aŭtobuson por viziti naturajn vidindaĵojn ĉe la marbordo—Tasman's Arch (Arko de Tasman), Devil's Kitchen (Kuirejo de la Diablo) kaj Blowhole (Suĉtruego)—kiujn kreis la agado de la maro kontraŭ le tero. La riverveturo estis laŭ la sama interesplena vojo, tra mejloj da montetoj, plejparte dense kovritaj de aŭstralia arbetaro, neniam malproksime de kaj ofte kun

vido de la maro, trans mirinde longa marŝoseo, preter la aerhaveno kaj denove trans la rivero Derwent pere de la mirinda flosponto, kiu, sepokonojn de mejlo longa kaj unu el nur du tiaj en la mondo, estas unu el la elstaraj de Hobarto.

SEMINARIO KAJ PRELEGOJ.

Kvarfoje dum la Kongreso, inter la 9a kaj la 10a matene, s-ro Ken Linton gvidis Lingvan Seminarion, kiu, malgraŭ la frua horo, allogis multnombre la kongresanojn, kaj streĉe altiris ilian atenton. S-ro Linton meritis specialan dankon pro sia multflanka laboro por la Kongreso. Dank' al li ni denove havis belegajn kongres-insignojn kaj poŝtkartojn. Li zorge preparis la kasraportojn de la Asocio kaj de la Zamenhof-fonduso, preparis kaj gvidis demandkonkurson, estris U.E.A. kunvenon kaj agis kiel anoncisto ĉe la koncerto.

Serion da 4 prelegoj kun belaj kolorkliŝoj prezentis s-ro J. Matasŝn. Li interese rakontis pri siaj vojaĝoj kaj observoj en Usono, Eŭropo kaj Malgranda Azio, kie li ĉiam ankaŭ kontaktis Esperantistojn.

Interesa prelego de S-ro R. Harry pri la traduko de "Aŭstraliaj Terminoj" atentigis pri multaj problemoj kaj instigis al pensado kaj diskutado tiurilate. Iom parenca sed pli petoleman alparolon faris s-ro F. Mueller-Sorau pri neordinaraj vortoj.

D-ro Ross Robbins parolis kun lumbildoj pri pasintjara vizito al Indonezio, kie li ankaŭ havis la oportunon renkonti Esperantistojn. Li finis la vesperon per kelkaj amuzajoj, inter kiuj li prezentis al la ĉeestantoj timeman sed amindan "simieton", kiun li nomis Herberto, sekretario de la unua simia Esperanto-Asocio. Kvankam la "gasteto" ne kapablis paroli Esperanton, li tre lerte komprenis kaj iageste respondis al demandoj en tiu lingvo.

Por prezenti la premiojn de la "Ese-konkurso", okazis, jaŭdon posttagmeze (7/1), speciala kunveno, kiun ĉeestis la estro de la Kvakera lernejo, s-ro W. N. Oats. S-ro Harry dankis al s-ro Oats pro lia progresa decido enkonduki Esperanton en la lernejon.

La temo de la konkurso (por ĝis 12-jaruloj) estis "Kial ni bezonas In-

STATUTO

DE LA

AUSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

I. ĜENERALAJ PRINCIPOJ

1. **Nomo.** La nomo de la asocio estas "Aŭstralia Esperanto-Asocio."
2. **Konsisto.** La Asocio konsistas el individuaj membroj kaj aliĝintaj esperantistaj organizaĵoj.
3. **Celoj.** La celoj de la Asocio estas:
 - (a) disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo, Esperanto,
 - (b) kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolviĝi ĉe ili komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj,
 - (c) zorgi pri la kunagado de esperantistaj organizaĵoj,
 - (ĉ) okazigi Tutlandajn Kongresojn kaj aliajn kongresojn kaj konferencojn.
4. **Neŭtraleco.** La Asocio estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj. En ĝi viroj kaj virinoj estas egalrajtaj kaj elekteblaj por ĉiuj oficoj.
5. **Lingvo.** La oficiala lingvo de la Asocio estas la zamenhofa lingvo, Esperanto, tia kia ĝi estas difinita per sia fundamento kaj per sia verkaro.
6. **Administra Jaro.** La administra jaro estas la kalendara jaro.
7. **Oficdaŭro.** Ĉiuj nepagataj oficoj daŭras du jarojn. La ofico-havantoj estas reelekteblaj.
8. **Respondeco.** Pri la agoj de siaj oficistoj kaj reprezentantoj la Asocio estas respondeca nur se ili agas laŭ siaj kompetentecoj.
9. **Sidejo.** La sidejo de la Asocio estas la urbo kie loĝas la Sekretario.

II. MEMBRECO

10. **Membro-kategorioj.** La kategorioj de membreco estas:
- (a) honoraj membroj laŭ decido de Generala Kunveno,
 - (b) ordinaraj, subtenantaj kaj dumvivaj membroj akceptitaj de la Estraro. Dumvivaj membroj pagas dudekoblan kotizon de ordinara membro.
 - (c) asociaj membroj, kiuj pagas pli malaltan kotizon ke ne ricevas gazeton,
 - (ĉ) familiaj membroj, kiuj pagas pli malaltan kotizon, ĉar jam estas en la familio membro kiu ricevas la gazeton,
 - (d) Junulaj membroj, kiuj pagas pli malaltan kotizon, ĉar ili studas kaj ne ricevas salajron.
- Decidojn pri akcepto de membroj, kun la escepto de honoraj membroj, faras la Estraro. Malakcepto ne bezonas klarigon fare de la Estraro. Asociaj membroj kaj membroj aĝaj malpli ol dek ok jarojn ne havas voĉdonrajton.
11. **Aliĝintaj Organizaĵoj.** Ĉiu aŭstralia organizaĵo esperantista povas aliĝi al la Asocio, se ĝi enĥavas almenaŭ sep membrojn, estas laŭorde organizita kaj estas neŭtrala laŭ la senco de paragrafo 4. Decidojn pri akcepto de organizaĵo faras la Estraro. Ĉiu organizaĵo kiu deziras aliĝi devas sendi al la Sekretario ekzempleron de sia regularo kaj liston de ofico-havantoj kaj membroj. Antaŭ la fino de ĉiu jaro aliĝinta organizaĵo sendas al la Sekretario novan liston kune kun kotizo pro ĉiu ano.
12. **Kotizoj.** Pri la jarkotizo de la diversaj kategorioj de membreco decidas Generala Kunveno.
13. **Eksigo.** Membro aŭ organizaĵo kiu dum la kuranta jaro, malgraŭ averto, ne pagis la koncernan kotizon, estas konsiderata kiel eksiginta. Tamen la Estraro povas decidi, ke membro kiu havas respektindan kaŭzon por nepago, restas membro sen voĉdonrajto.
14. **Eksigo.** Membro, kiu evidente kontraŭlaboras la celojn de la Asocio, aŭ ties decidojn povas esti eksigata, post esplorado de la kazo. Decidojn pri eksigo faras la Estraro. Protestojn pridecidas la Generala Kunveno. Eksigo de organizaĵo bezonas la decidon de la Generala Kunveno aŭ la unuaniman decidon de la Estraro.

III. ĜENERALAJ KUNVENOJ

15. **Ordinaraj kaj Specialaj Kunvenoj.** Almenaŭ unufoje en ĉiu du jaroj okazas ordinara ĝenerala kunveno de la Asocio por aŭskulti kaj eventuale diskuti la raportojn de la Estraro, por decidi pri la venonta agadmaniero kaj kotizoj de la Asocio, por elekti la oficistojn kaj Estraron por la venonta dujara periodo kaj por elekti, se necesas, specialajn komisionojn. Se triono de la membroj skribe petas specialan ĝeneralan kunvenon, la Sekretario aŭ alia estrarano kunvenon alvokas ĉe la sidejo de la Asocio.
16. **Anoncoj.** La Sekretario anoncas en la oficiala organo, almenaŭ tri monatojn antaŭe, la daton kaj lokon de la ordinara Ĝenerala Kunveno. Ĝi okazas kutime en la kadro de Tutlanda Kongreso.

17. **Tagordo.** La Sekretario anoncas almenaŭ unu monaton antaŭe la provizoran tagordon de la Kunveno. La tagordo de ordinara kunveno almenaŭ inkluzivas: prezentadon kaj aprobon de la jarraporto kaj financa raporto de la Asocio, elekton de Estraro, diversajn proponojn kaj demandojn skribe proponitajn de aliĝinta organizaĵo, aŭ du aŭ pli membroj.
18. **Debato.** La Prezidanto aŭ Vicprezidanto, aŭ estrarano nomita tiucele de la Prezidanto, prezidas ĉiun sesion de Generala Kunveno. Li certigas, ke la debato estas konforma al ĉi tiu statuto, kaj rajtas insisti, ke parolantoj limigas sin al la eroj de la tagordo.
19. **Decidoj.** Kunsidoj de Generala Kunveno validas se ĉeestas almenaŭ dudek membroj. Membro kiu ne povas ĉeesti Generalan Kunvenon rajtas skribe nomi alian membron por reprezenti lin. Decidoj estas farataj per simpla plimulto de voĉoj kun la escepto de decidoj pri:
 - (a) la kapitalo de la Asocio,
 - (b) aliĝo al internaciaj organizaĵoj,
 - (c) pago de salajro al ofichavanto por kiuj du trionoj de ĉeestantoj devas voĉdoni por la rezolucio, kaj la ĉeestantaro devas reprezenti almenaŭ duonon de la tuta membraro.
 - (ĉ) ŝanĝo de la statuto (vidu sub Paragrafo 29).

ESTRARO

20. **Konsisto.** La Estraro konsistas el
 - (a) Prezidanto, du Vic-Prezidantoj, Sekretario kaj Kasisto, elektitaj individue.
 - (b) Post la Kongreso la Estraro akceptos po unu plua estrarano proponita de ĉiu aliĝinta organizaĵo ne reprezentata en la EstraroEn kazo de eksigo de estrarano la Estraro kompletigas aŭtonome per invito de kvalifikita membro por la periodo restanta ĝis novaj elektoj.
21. **Kompetencoj.** La Estraro plenumas la decidojn de la Generala Kunveno, gvidas la aferojn de la Asocio, kreas kaj administras servojn kaj aranĝojn konforme al la celoj de la Asocio kaj la decidoj de la Generala Kunveno. Ĝi ankaŭ interrilatas kun eksterlandaj kaj tutmondaj organizaĵoj. La estrarkunsidoj validas se partoprenas almenaŭ tri estraranoj. La protokolo de ĉiu kunsido estas sendata al ĉiu estrarano, kune kun anonco pri la venonta kunsido.
22. **Prezidanto.** La Prezidanto reprezentas la Asocion kaj subskribas kun la Sekretario la ĉefajn dokumentojn. Li prezidas la Generalan Kunvenon (vidu paragrafon 18 supre), kunvokas kaj prezidas la estrarkunsidojn, kaj malfermas la Tutlandajn Kongresojn. Lia voĉo decidas en kazo de voĉegaleco. Se li ne povas ĉeesti kunvenon li nomas vic-prezidanton aŭ, se nek unu nek alia vic-prezidanto ĉeestos, alian estraranon por prezidi.

V. KOMISIOJ, GAZETO, BIBLIOTEKO, LIBRO-SERVO

23. **Komisioj.** Por esplori iujn problemojn aŭ por plenumo de difnita tasko la Generala Kunveno aŭ la Estraro rajtas elekti ekster aŭ inter si reprezentantojn aŭ specialajn komisionojn por la daŭro de al ili komisiita tasko.
24. **Gazeto.** La Asocio eldonas propran gazeton, kiu servas ankaŭ kiel oficiala informilo. La redaktoron aŭ redakcian komitaton nomas la Estraro, inter aŭ ekster si.
25. **Biblioteko.** La Asocio organizas bibliotekon de libroj, gazetoj, filmoj, sonbendoj kaj eldonaĵoj. Ĝi servas al ĉiu membro de la Asocio. La Estraro decidas pri la bibliotekisto kaj pri kondiĉoj de uzo.
26. **Libroservo.** La Asocio organizas libroservon en ĉiu ĉefurbo kie estas aliĝinta organizaĵo. La perantojn nomas la Estraro.

VI. FINANCOJ

27. **Administrado.** La kasisto administras ĉiujn monaferojn de la Asocio, kun escepto de la kapitalo, kaj publikigas la jARBILANCOJN.
28. **Kapitalo.** La kotizoj de dumvivaj membroj, ĝeneralaj donacoj superantaj sumon fiksitan de Generala Kunveno, kaj heredaĵoj formas la asocian kapitalon kaj estas daŭre posedataj de kuratoroj elektitaj de Generala Kunveno, kiu rajtas elekti, se necese, apartajn kuratorojn por fondusoj kun apartaj celoj. Generala Kunveno difinas la kondiĉojn laŭ kiuj la kuratoroj posedas proprajn.

VII. ŜANĜO DE LA STATUTO KAJ DISSOLVO

29. **Ŝanĝo.** Ĉi tiu statuto povas esti ŝanĝata nur
 - (a) de Generala Kunveno kondiĉe, ke du trionoj de ĉeestantoj voĉdonu por la ŝanĝoj kaj ke la ĉeestantaro reprezentu almenaŭ duonon de la membraro,
 - (b) post diskuto en Generala Kunveno, per ĝenerala voĉdono en kiu la voĉdoniloj estas senditaj poste al ĉiu membro, voĉoj (kalkulitaj 90 tagojn post la dissendo) estas ricevitaj el almenaŭ duono de la tuta membraro kaj almenaŭ du trionoj de la voĉoj estas por la ŝanĝo.En ambaŭ kazoj la membroj devas esti informitaj pri la proponataj ŝanĝoj almenaŭ tri monatojn antaŭ la voĉdono.
30. **Dissolvo.** Libervola dissolvo de la Asocio povas okazi nur observante la kondiĉojn de paragrafo 29-a de ĉi tiu statuto. La restanta havaĵo estos deponata tri jarojn favore al Esperantistoj, kiuj intencas fondi similan asocion. Se tio ne okazas, la havaĵo estos donacata al alia Esperanto-organizaĵo, kiun indikas la decido pri dissolvo.

ternacian Lingvon" kaj estis koincido ke gajnis la unuan premion (£3/3/-) Alison Oats, filino de s-ro W. N. Oats. Duan premion (£2/2/-) gajnis Prue Nightingale, filino de la Sekretario de la Hobart Esperanto-grupo, kaj dividis la trian premion (£1/1/-) Jennifer Mary Aston, Janifer Lee Clarke kaj Armanda Murray Parrish (ĉiuj el Hobart).

Esperanto - "Quiz"

Nova aranĝo ĉe Esperantokongreso estis Esperanto - Demandkonkurso ("Quiz") preparita kaj gvidata de s-ano K. Linton. Kvar teamoj partoprenis, ĉiuj konsistantaj el 5 membroj. Ĉiu teamo devis respondi al 50 demandoj (po 10 demandoj por ĉiu teamano). Gajnis la konkurson la teamo de Melburno (s-ino Hill, s-roj Fridenbergs, McKenzie kaj ges-roj Koppel) per 35 poentoj; dua estis la teamo "Cetera Aŭstralio" (f-ino Samblebe, Melbourne); s-roj Grant, Pt. Lincoln; Harry, Canberra; Mad-dern, Moe; D-ro Robbins, Canberra), per 27 poentoj; tria estis Sydney (f-no Dash, s-roj Dash, Gueltling, Matasin, Mueller-Sorau) per 24 poentoj, kaj kvara estis Hobart (s-ino Blackmore, ges-roj Cooper, ges-roj Leereveld) per 15 poentoj.

Tiu konkurso provizis instruon kaj amuzon al ĉiuj partoprenantoj kaj aŭskultantoj. Ĝi respegulis ankaŭ la gajan spiriton de la tuta kongreso, ekzemple kiam D-ro Ross Robbins malkaŝe "sekrete" provis per £1 "sub-aĉeti" la Gvidanton, aŭ kiam Hobart-ano ŝerce demandis, ĉu ankaŭ s-ro Linton estas ano de la Melburna teamo?

INTERNACIA KONCERTO, kuintima okazaĵo dum niaj Kongresoj, dank' al la afableco de kelkaj naciaj grupoj kaj individuaj artistoj ne mankis en Hobarto. Ĉi tiu okazis jaŭde (7/1) dum malseke varmega vespero, kaj oni ne povas ne admiri la heroan sindonon per kiu la artistoj plenumis siajn promesojn ne nur kantante sed ankaŭ dancante en longaj aŭ dikaj naciaj kostumoj. La programo inkluzivis belan pianludadon, kantojn en angla kaj kimra lingvoj krom en Esperanto, latvajn kaj skotajn dancojn kaj bonan distradon fare de nia propra Esperantista magiisto, D-ro Robbins. Ĉi ties fina produkto de kuko post ŝajna fiasko estis vere miriga. Certe kelk-

ajn strangajn kvalitojn havis tiu kuko. Supozeble oni preferus ke ĉokoladocon ĝi surpronus pro vera ĉokolado pli ol bruna ciro, sed la enhavo de dentpurajo, por ke ĝi purigu la dentojn jam dum oni manĝas, eble estas bona inventaĵo kaj ne tro akre distingebla.

ADIAŬA FESTMANĜO estis io nova en la Kongresaj aranĝoj, sed eble oni povus diri, ke ĉi tiu, okazinte en belaj ĉirkaŭaĵoj en unu el la plej bonaj hoteloj de Hobarto (Hadley's), kun bonege preparitaj manĝaĵoj kaj gaja ĉeestantaro, iomete moligis la malĝojon de la fina adiaŭo. Prezidis D-ro Robbins, kiu, de tempo al tempo, petis parolon al iu kongresano. Parolis antaŭ la manĝo s-ro H. Koppel, kiu inter aliaj aludis al la ĝojo renkonti denove malnovajn amikojn kaj al la ĉiama juneco de la sam-inoj, kaj poste aldonis ke, traveturinte survoje lokojn kiel Bagdad kaj Jericho kaj transirinte la riveron Jordan, li sentis sin pli en la oriento ol en Hobarto, des pli kiam li eksciis ke troviĝas tie ĉi Ali (s-ino Leereveld) kaj la rabistoj (kelkaj kafjestroj kaj fruktovendistoj ne-esperantistaj). Parolis ankaŭ s-roj Leereveld kaj Nightingale iom pli serioze kaj emocie pri la ĝuoj kaj timoj aranĝi kongreson kaj pri la bedaŭinda adiaŭo. Samtempe S-ro Nightingale kaptis la okazon transdoni al s-ino Shankley memoraĵon kiel dankesprimon pro ŝia laboro kiel sekretario de la Kongres-Komitato. F-ino A. Godfrey, kiu parolis laste, regajigis la ĉeestantaron per lerte sprita alparolo, pri kiu ni tamen ne tro detale raportu. Tion, kion ŝi diris pri si mem, ni ne ripetu, ĉar eble la leganto malĝuste taksos ŝin; ankaŭ ŝian sugeston por la disponigo de la Zamenhof-fonduso, kvankam ĝin eble aprobas kelkaj malnovaj E-istoj, ni preterlasu pro timo ke la donacintoj tuj postulos redonon de la mono. Nur tro rapide alvenis la fina horo: kun interfirmitaj manoj, la ĉeestantoj komune kantis "Malnovaj Tagoj": manoj kunpremiĝis; aŭdiĝis "Ĝis revido!"

Kaj ni ripetu: "Gratulojn, Hobartanoj!" Ĝis revido en Canberra!

TRIBUTO AL LA HOBARTANOJ

Pri la Kongres-organizantoj mem multe estas dirinde. Nur estas be-

daŭrinde ke manko de spaco kaj eble de scio malebligas mension pri ĉiu meritanto. Certe multaj kontribuis al la Kongreso, kaj ekde la komenco vizitantoj havis la senton, ke la lokaj Esperantistoj vere laboras kiel teamo.

Jam menciita estas la laboro de s-ino Shankley kiel sekretario de la Kongres-komitato, de la samideaninoj ĝenerale pro la bonveniga manĝeto, kaj de s-ro Lancaster, reĝisoro de teatraĵo. Aparte menciindaj estas ankaŭ la penoj de S-ino Cooper, kiu prizorgis kaj bone negocis ĉe libro-stando, de s-ro Cooper kiel kasisto por Kongresaj aranĝoj, de s-ro Nightingale, Sekretario de la Hobarta grupo, kiu negocis la urbestran akcepton, de s-ino Douglas, kiu organizis la Koncerton, kaj de s-ro M. Leereveld, kiu jam du jarojn antaŭe kuraĝe entreprenis okazigi kongreson en Hobarto kaj forte laboris tiurilate kaj antaŭ kaj malantaŭ la kulisoj.

Ĉiuj Hobartanoj sin montris amikemaj kaj helpemaj, sed speciale neforgesebla estas la gastamo de s-ino Leereveld, kiu ne nur loĝigis sed plurfoje, antaŭ, dum kaj post la Kongreso, gastigis vizitantojn.

Denove, mil dankojn, Hobartanoj.

ZAMENHOF - FESTOJ

La centjaran jubileon de la naskiĝtago de la Majstro solenis la diversaj kluboj tra Australio.

En **BRISBANE** proks. 30 personoj kunvenis ĉe festmanĝo en la Canberra-Hotelo. Ges-roj A. Grant bele dekoraciis la salonon. Inter vizitantoj estis ankaŭ bulgara s-ano Vlado Koseff, kiu speciale venis al Brisbane el kampara loko por partopreni la feston. La festparoladon faris s-ro S. L. Parry kaj s-ino Fraser tradukis anglan por ne-Esperantistoj.

En **SYDNEY** festmanĝo okazis en "All Nations' Club", King's Cross. Sekvis paroladoj de s-ino Grace Kirkwood kaj s-roj Rutland, Chandler, Gueltling, Matasin kaj Mueller-Sorau.

En **HOBART** 15 ge-samideanoj estis la gastoj de Ges-roj Nightingale. Post bonega vespermanĝo faris la prezidanto, s-ro M. Leereveld, la festparoladon. S-ino Roberts solkantis kaj s-ino Douglas deklamis Esperanto-poemoj. La vespero finiĝis per komuna kantado.

La plej granda festo okazis en **MELBURNO**. Proksimume 130 personoj kolektiĝis en la Y. W. C. A. Memorial Hall. Penny Harry, filino de s-ro Harry, deklamis "La Vojo", profesiaj ge-kantistoj kaj ge-muzikistoj distris la ĉeestantojn kaj la kulmino estis la festparolado de s-ro Harry pri la personeco kaj verko de D-ro Zamenhof. Ampleksa libro-stando funkciis en la halo kaj s-ino I. Milligan vendis multajn Esperantaĵojn.

El **PERTH** ni ankoraŭ ne ricevis raporton, sed ni esperas ke spite de la longa distanco raporto atingos nin por publikigi ĝin en la venonta numero.—H.K.

VICTORIAN ESPERANTO CONFERENCE MOE, 16th to 18th April, 1960

To this Conference, to be held at the Moe High School, Easter Saturday, Sunday and Monday, we specially invite learners of the language. It will be not only a Conference but also an adult school to help us all to be more proficient in using Esperanto.

The following is a draft programme:

Friday, 15/4/60—

9 p.m., Welcome at the High School. (Supper.)

Saturday, 16/4/60—

9-10 a.m., Junior and Senior Classes.

10.30 a.m., Morning Tea.

11 a.m.-12 noon, Talk on "Brown Coal."

2-4 p.m., Visit to S.E.C. Brown Coal Mine, Yallourn.

4 p.m., Afternoon Tea.

8-10 p.m., Entertainment — Community Singing, Poetry Reading, One-act Play, Individual Items, Supper.

Sunday, 17/4/60—

9-10 a.m., Junior and Senior Classes.

10.30 a.m., Morning Tea.

Rest of morning free.

2-4 p.m., Picnic at Narracan Falls.

4 p.m., Afternoon Tea.

8-9 p.m., Short Story Reading.

9.30 p.m., Supper.

Monday, 18/4/60—

9-10 a.m., Junior and Senior Classes.

10.30 a.m., Morning Tea.

11 a.m.-12 noon, Talk: "Names of People."

2-3 p.m., Tour of Moe.

3.30 p.m., Afternoon Tea.

4 p.m., Close of Conference.

Accommodation can be provided at the Moe Hotel or the Club Hotel from 35/- to £2 per day for bed, breakfast and evening meal. The mid-day meal will cost 5/- or 7/6 extra.

Subscription fee for the Conference is 10/- (to cover such costs as morning tea, etc.).

Those who will be attending the Conference and wish accommodation to be booked should forward £2/10/- not later than the 15th March, to the Secretary, I. T. Maddern, High School, Moe.

TRANSLATION COURSE

The course consists of a text in English to be translated and sent to the Kondukanto by the 25th of each month. He then forwards his own translation, with notes, and the corrected papers of members, together with a piece to be translated for the next month. It is not an elementary course, but one designed to test the ability and improve the style of those already able to read and write Esperanto with facility.

The fee is 15/- yearly, for 12 issues. This covers postage and material for purely honorary work.—F. R. Banham, 2 Banchory Street, Essendon, W5, Victoria.

Plumeraroj: N-ro 9, p. 21: Legu: *Il Principe*. N-ro 10, p. 30: Legu: *Wueter*. N-ro 11, p. 40: Legu: *W. 5* (en la dua kolono). P. 10, *Speciala* n-ro: ĉe la mencio pri Luyken legu, "Paŭlo Debenham", "Stranga" k.t.p.

RECENZOTAJ

Taglibro de Anne Frank: Eld. Heroldo de E-o.

Virino ĉe la Landlimo: Drametoj kaj Skeĉoj de Marjorie Boulton. Eld. OKO, Kopenhago.

Plena Gramatiko: 3a eld., unua kaj-tri-a. Eld. Esp. Prop. Centro, Milano.

Nia Hejmo: F. C. Xavier. Eld. Fed. E. Brasileira. Rio de Janeiro.

Bofilino: G. Karaslavov. Eld. Fremdlingva Eldonejo, Sofio.

Eroj: Nia plejvasta originala poemaro: M. Boulton. Stafeto, Tenerife.

Essential Esperanto: W. A. Gething, F.B.E.A. Eld. W. Foulsham and Co., London.

NEKROLOGO

La 6an de novembro, 1959, forpasis **Norman Gibson Mills, D.B.E.A.**, en la ago de 69 jaroj. Naskita en Viktorio, li lernis Esperanton en 1909, kaj estis amiko de Gego, Ezoko, Del-sudo (G. Gordon, J. G. Pyke, M. Hyde) kaj aliaj pioniroj de la movado.

Profesie li estis instruisto pri elektro-aferoj ĉe la Ŝtata Kolegio de Teknikoj, kaj post emeritiĝo en 1956 li partatempe deĵoris en tiu fako kiel kontrolisto de kolegiaj ekzamenoj. Seriozmiena, bonkora, malavara, li estis tre bona amiko al la Esp-istoj ĉi tie; li, kun sia edzino, dum pli ol tridek jaroj gastigis preskaŭ ĉiun Esp-iston, kiu vizitis Brisbanon. Amegante nian lingvon, li estis tre postulema pri gramatiko. Aŭtoritate kaj multscie, li pridiskutis tiun temon, samtempe donante bonan helpon kaj konsilon. Tiom kara estis la lingvo por li, ke, dum vizito de nia sek-ino al li en la hospitalo, ne multe da horoj antaŭ ol li mortis, li vigle interparolis kun ŝi en Esperanto pri multaj temoj.

Ĉe la kremaciejo, la granda nombro da funebrantoj kaj florgirlandoj, kiuj tributis lin, konstatigis nin pri nia granda perdo.

Adiaŭ, Norman Mills. Ni fieras, ke vi nomis nin geamikoj.—S. L. Parry.

CARL BARTEL

"La Rondo", Nov. 1958.

Sub poŝtstampo 23.2.59 mi ricevis poŝtkarton de tiu tre merithava veterano. E-Grupo fondita de li en 1905 ankoraŭ floras kaj daŭre ricevas vizitantojn de eksterlando. En 1905 li korespondis kun s-ro Ballard, kiu tiutempe loĝis en Akarao. Poste ankaŭ li interŝanĝis leterojn kun s-ro Linton kaj s-ro Gamble; la dua sam-o vizitis al Bartel en 1957. Ankaŭ s-ro Potts siatempe. Hitler detruis liajn valorajn E-arkivojn ankaŭ liajn framasonajn dokumentojn k.s. Li eble vizitos la Kongreson en Bruselo 1960.

Hans Jakob en "Esperanto", Junio 1955, p. 178, mencias, ke Bartel ĉeestis la Kongreson en Boulogne-sur-Mer, 1905.

Eksterordinara afero krome estas, ke Carl Bartel ankoraŭ loĝas ĉe tiu sama adreso ĉe kiu li loĝis en 1906 (aŭ pli frue): vidu en La Leteroj de

Z., vol. 1, p. 285. Tie Zam. petas telegrafi al ĝuste tiu adreso, kie supozinde li estis gastigata! "Bartel, Wohlerstrasse 14, Frankfurt - am - Main."

Mi havas surskribitan per lia nomo bonan foton de nia brava kaj longeviva samcelanto. Dato 1959; ankaŭ p. karton en kiu li donas detalojn de sia vivo kaj atesprimon pro la artikolo en "La Rondo".

Sincere ni deziras al li ankoraŭ spacon da utila vivtempo, kaj multe da plezuro el nia komuna laboro.

—F. R. Banham (Melburno).

MASEL PRIZE.

Prose Section.—Nil. Insufficient entries.

Poetry Section.—The prize was divided between Mr. F. Mueller-Sorau, Petersham, N.S.W., and Mrs. G. Pollard, Riverton, W.A.

To the winners our congratulations; to the judge, Dr. C. Caldera, our warm thanks.—A.S.

Interested in the next one? Write to Mrs. A. B. Sedgley, 123 Gregory Street, Wembley Park, W. Aust.

Tempesto super Akonkagvo: Tibor Sekelj. Eld. Serbia E-Ligo.

La Esperanta Traduko de la Malnova Testamento: D. B. Gregor, propra eldono. (Aldonu al listo, p. 67.)

Daily Sketch Modern Boys' Annual. 198 pp. 9/6 stg.

Edited by Robert Campion, a member of the British Esperanto Association. A richly illustrated collection of stories, articles and features for boys of all ages. The 8-page picture strip on Dr. Zamenhof conveys with impressive simplicity the significance of his life and work. The B.E.A. ordered 10,000 copies of the strip, which should now be available. We confidently recommend this book, which is among the best of its kind.

Associated Newspapers, Tallis St., London, E.C.4, supplied our copy.

FRAZENIGMO

"Por malkovri necesas bonŝanco, eltrovi spirito, kaj la du ne povas malhavi ambaŭ"—p. 95, Norda Prismo.

Kiu komprenus tiun frazon? Se efektive vi komprenas ĝin, bonvolu traduki, por ke ankaŭ ni komprenu.

Competition.—Send an Esperanto letter by air to Esperanto-Klubo, Poŝtfako 275, Ljubljana, Jugoslavia, on the subject: How I live and act as an Esperantist,—to reach them by 1 May, 1960. Prizes are year-collections of La Suda Stelo for the ten best, and ten more prizes by lottery from all the others.

KORESPONDADO

Ilija Vičev, PLEVEN—At. Linkov, 4, Bulgaria, interŝanĝas revuojn, fotojn kaj medicinan literaturon.

Per sendo de aĵoj helpu al Rama Hegde, 7a Balgovindas Rd., Mahim, Bombay 16. Li aktivigas fondi E-movadon en Hindujo.

Kun Aŭstraliaj amikoj kor-as Paul Weyda, Auricher Str. 47/Eg., Stuttgart-Rot, Germany.

German E-ist, 23 years, commercial man, intends to migrate to Australia with wife at end of year. Wishes contacts with E-ists in Australia. Who will write? Heinz Mueller, 17b Freiburg/Brsgr., Beurbarungsstr, 25, Germany.

SPRITA PIKO

Sur p. 13, "Rimportretoj" troviĝas la jena intence frazordita poemeto Per ĝi Kalocsay moketas la artifikojn de konata versisto:

Poemo ĉi popola kanto
simpliĝis pli ol, per transporto.
Bartelmes—la Faŭst-tradukanto,
jonglata per ludadas vorto.

Ĝuste parafrazite, ĝi sencas: Per transporto, ĉi poemo simpliĝis pli ol popola kanto. Bartelmes—la Faŭst-tradukanto — ludadas per jonglata vorto.

★ ★ ★

Knowledge of the international language must be as thorough as that of the mother tongue. The general culture and specialised learning of every person speaking Esperanto must, broadly, be reflected in the international language as effectively as it is in his or her national language.

—Dr. I. Lapenna in "Retoriko".

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



Editor: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.

Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

No. 18 (98).

MELBURNO

Okt. - Nov., 1960

WATCHING, NOT WORKING FOR THE TRIUMPH

After Six Decades This Reproach is Applicable Today.

Letter from Mr. X.—

For long I have not written to you, and doubtless you think that I was once a fervent friend of Esperanto, but have now forgotten about it. If you think so, you are wrong. I've always been a warm friend of Esperanto and shall never forget it. When, however, I began some time ago to work for it, I met such difficulties that I had to give it up, having come to the conclusion that the world is not yet ripe for this great conception. Nevertheless you may rest assured that when circumstances change, and the obtuseness and indifference of the world pass off, you shall again see me in the ranks of the most energetic workers for the movement. Please write, telling me what has happened since I ceased active interest in Esperanto. How many members has the movement now? What new books have been published: If "La Esperantisto" is still coming out, send me a copy of it. You might send me news of Esperanto from time to time so that I don't wholly forget about it.

Zamenhof replied in "Lingvo Internacia" vii, 1902, p. 116:—

Now isn't this an edifying and large-souled way of thinking. When, thanks to our tireless, patient and difficult labor, we shall have reached our great goal; when we may wipe the sweat from our brows, and after seemingly interminable disappoint-

ment, mockery and bitterness raise our heads to look with pleasure on the fruits of our travail, then Mr. X will join us and become one of our "most energetic workers"! Meanwhile "the world is not ripe," so he can't be an "active Esperantist," nor even subscribe to "La Esperantisto," which gazette is so valued by him. No! His devotion to our affairs finds expression in asking us—already having little time to spare—to write to him from time to time on how things stand with us.

It won't do, my pseudo-Esperantists. Every new, useful idea must at first fight its way with difficulty; and that sooner or later it succeeds. When, thanks to our constancy, the world at last listens to us, and our affair ceases to be regarded as a fantasy fit only for satirical indifference or ridicule—when Esperanto is everywhere accepted and sanctioned—then we shall not need you.

You made some small effort to forward Esperanto, but seeing little result you didn't persist. If our work were for things that gain a facile success, we could find millions of workers—and you wouldn't be needed. You (and your number are great) who stand aside and wait, please don't promise to join us when the world is "ripe", for then we shall not need "ripeners", and after the victory we shall not need helpers. If you really love a cause, work for it now, when it calls for long and ar-

duous spadework. Stand firm as a rock amid the waves, now, when circumstances are not favorable.

You, sir, and others like you, who now enjoy the fruits of new ideas, have, we fear, little thought of the bitter toil with which they were disseminated. We, true friends of the world language, know it very well, and we work with undying patience, having no fear that the depressing deafness of the world or the cruel shocks of circumstances shall ever push us from our path. Armed with this iron patience and by the consciousness of the truth inherent in our cause, we go on in spite of all that bars our advance, certain that in time we shall conquer.

Rest yet awhile, Mr. X, and those millions of others who prefer to wait till mockery and persecution cease and give place to acceptance of Esperanto. But don't call yourselves Esperantists.

We are battering the thick wall that separates the peoples. A hundred blows may be resultless, but we lose no courage for that. We are content if the next blow loosens a brick. One day there shall suddenly operate millions of tiny fissures which, unknown to us, were caused by our steady hammering. Then the wall, widely weakened, shall fall into rubble before us, and you and other men of short sight will wonder how it all happened, seeing that yesterday all but a hundredth of the grim barrier stood intact.

In that time you will run to us, offering to join your voice to ours in the song of triumph, and saying: We too have worked for this!

History, however, will not be silent. It will point the difference between those that worked and those that waited.—(Translated from the original Esperanto text.)

AUSTRALIAN HUMOR.

S-ro M. Pančev, Str. Persenk N 30, Sofia, Bulgaria, asks for E-translations of Australian humor, for inclusion in a projected Anthology of International Humor. Clever newspaper articles with a strong comic slant would be the thing, or the work of short-story writers, given their permission.

Australia Kroniko

Okaze de ĉiu tutlanda kongreso la klub-reprezentantoj plendas pro malofta apero de nia gazeto. Tio estas kaŭzata de malmultnombra membraro. Sed la samaj plendantoj tute silentas se temas pri regula sendado de klub-raportoj por eĉ la nuna malofta apero.

Ĉu vere estas tiel malfacile elekti en ĉiu klubo raportanton, kiu sendas ĉiun sesan semajnon mallongan raporton al Box 2122T., Elizabeth Street Post Office, Melbourne??

● **MELBOURNE:** Dejorante denove je 3/8, S-ro K. Linton dividis sian tempon inter beleco kaj malfacilo de esprimo. Vortoj de Julio Baghy okaze de vizito al la tombo de la Majstro provizis bonegan ekzemplon de la unua. Plua konsilo pri kunmetitaj verboj, precipe pasivaj formoj, okupis la duan parton de lia prelego.

Je 10/8 S-ro Ryding montris belajn kolorkliŝojn pri diversaj Pacifikaj insuloj vizititaj de li survoje al Eŭropo. Treege interesaj estis ankaŭ kelkaj kiuj montris vojaĝon tra Panamo.

Muzikverkisto, Franz Schubert, estis la temo, kiam S-ro E. McKenzie surprenis sur sin la programon por 17/8. Informo intermiksita kun pluraj kantoj el ties granda verkajaro tre agrable pasigis la tempon. La voĉo sur magnetofonbendo estis tiu de franca kantisto, Gerard Souzay.

Je 24/8 S-ro Ryding daŭrigis sian prezentadon de interesaj kolorkliŝoj pri sia vojaĝo eksterlande. Ĉi-foje la montrata mondparto estis ĉefe Norda Italujo, inter Marseilles, kie niaj samideanoj elŝipiĝis, ĝis Trieste survoje al Jugoslavujo.

"Evitu malklarecon" konsilis S-ro K. Linton (31/8), kiam li daŭrigis sian instruadon pri bona esprimado. Zorgema elektado de la ĝusta prepozicio estis la ĉefa punkto, kiun li emfazis per citaĵoj el "Krestomatio" kun kritikoj de Pastro J. W. Downes.

Malgraŭ tre pluva vetero, la jara merkatespero — "American Tea" — estis sukcesplena okazo (7/9).

Tri vendotabloj starigis. Amaso da libroj kaj gazetoj malaltkostaj allogis legadamantojn al unu. Ĉe alia troviĝis multvaria vendotajaro—sukeraĵoj, spicaĵoj, tolaĵoj, kuirejaj iloj kaj ujoj, floroj kaj fruktoj, el kiuj multaj malaperis pli rapide ol ili aperis.

Gaja marĉandado intermiksiĝis kun loterumo de pluraj valoraĵoj, kiu pli vigligis la intereson kaj ĝojigis la korojn de kelkaj feliĉul(in)oj. F-ino Atica Fridenbergs, kies ofta forpreno de la kuko jam fariĝis legendo, ankoraŭfoje gajnis. Kelkaj anoj tre ŝatus ekscii ŝian sekreton.

Je la fino ĉiuj sin refreŝigis ĉe tria tablo kie teo kaj manĝaĵoj estis haveblaj kontraŭ plua elspezo.

Malavara donacado, malmodera elspezado kaj malsaniga manĝado kontribuis al kontentiga rezulto—entute £22/8/0.

Dum pluraj jaroj la Melburna Esperanto-Klubo kutimis dividi ĉi tiun enspezon kun A.E.A. kaj faris sian eblon instigi aliajn klubojn al simila subteno, sed, ĉar ĝis nun neniu klubo iel respondis al tiu peto, la Melburna Klubo ĉijare decidis dediĉi la enspezon al aĉeto de akcioj de la Melburna Esperanto-Ko-operativo. Tamen oni devas atentigi, ke, sen ia subtenado je la parto de ĉiuj kluboj kune, A.E.A. baldaŭ jam ne ekzistos kaj ĝia gazeto, "The Australian Esperantist" ne plu aperos.

RENDEVUO: La parolanto por Aŭgusto estis S-ro H. Koppel, kiu, ĉerpante ankoraŭfoje el sia serio "Biografioj de Famaj Homoj", prelegis ĉi-foje pri du mezepokaj sciencistoj, kies penso kaj profunda studado malkovris multajn "sekretojn" de la naturo. La unua estis Copernicus, polo, kiu troviĝis novan respondon al la enigmo de l'Universo. Malgraŭ multtempa dediĉo al homaj bezonoj kaj malsanoj, tiu tamen trovis tempon ankaŭ por multjara observado kaj kalkulado, el kiuj, tute sen instrumentoj, li jam en la jaro 1543 ellaboris la sistemon de planedoj en nia universo, kiun oni akceptas ankoraŭ hodiaŭ, kaj kalkulis la longecon de la jaro kun eraro de nur 28 sekundoj.

La dua estis Galileo Galilei, italo, kiu, sekvante similan vojon, ne nur malkovris la ritmon de la naturo kaj ellaboris la leĝojn pri movado, kiuj provizis la bazon por moderna mekaniko, sed ankaŭ inventis gravajn instrumentojn, ekz. la teleskopon kaj la komponon.

La tragedio estis, kiel ofte okazas pri proklamantoj de nova scio, ke ili estis tro kleraj por la samtempuloj, kiuj malakceptis la veron kaj persekutis la trovintojn.—F.K.

INAŬGURO DE LA MELBURNA ESPERANTO-DOMO.

Vendrede, la 12-a de Aŭgusto 1960 restos por ĉiam memorinda tago en la historio de la Aŭstralia Esperantomovado, ĉar estis je ĉi tiu dato ke la unua Esperanto-Domo en Aŭstralio estis malfermata.

42 gesamideanoj ĉeestis la malfermon de la domo, kiu apartenas al Ko-operativo de Melburnaj E-istoj. Inter la partoprenantoj ni ĝojis saluti la Prezidanton de la Sydney E-Societo (S-anon J. Matasin), kiu speciale veturis al Melburno por ĉeesti la feston.

Belaj floroj ornamis ĉiun ĉambron de la domo. Tio estis arte aranĝita de S-ino Ryding.

S-ro McKenzie malfermis la kunvenon kaj bonvenigis la ĉeestantojn. S-ro Matasin, en la nomo de la Sydney E-Societo, transdonis salutojn kaj gratulojn. Li rakontis pri simila domo kiun planas la Sidnejanoj.

S-ro H. Koppel laŭtlegis telegramon de S-ro A. Fridenbergs, kiu libertempis en Kvinlando kaj mem ne povis partopreni la feston, kvankam estis li kaj lia filino Atika kiuj plej forte laboris por la domo. Alia telegramo venis de la Sydney E-Societo, kiun la ĉeestantoj akceptis kun aplaŭdo.

D-ro Fred Williams, kiu formale malfermis la domon, alportis la salutojn de la A.E.A. Prezidanto, S-ano Ralph Harry, kiu ne povis persone ĉeesti, sed kiu per longa letero sendis siajn gratulojn kaj kiu esprimis la esperon ke baldaŭ ĉeno da Esperanto-Domoj ekzistu tra tuta Aŭstralio. D-ro Williams gratulis du "frenezulojn" (D-ro Fridenbergs kaj H. Koppel) kiuj dum la Hobarta Kongreso multe pledis por starigo de Esperanto-Domo, kaj li atentigis ke el tiu "frenezeco" rezultis la hodiaŭa efektiva de la revuo.

Post distribuo de la akcioj de la Ko-operativo, S-ro Matasin prezentis belegajn lumbildojn, kiujn li faris en Hispanujo dum sia mondvojaĝo. Luksa vespermanĝo finis tiun memorindan vesperon.

● **PERTH:** Sangoj okazis en nia Ligo pro malsano de nia sekretario, S-no Pollard. Si eniris hospitalon por hirurgia operacio kaj forestos

dum kelkaj semajnoj. Intertempe S-ino Sedgley prizorgas sekretariajn taskojn, kaj F-ino Longson gvidas studantojn.

Je 13 Aŭgusto okazis societa kunveno. Sub estrado de vic-prezidanto Dean, programo de koloritaj fotografaj, muziko kaj novaĵoj pri Esp-o distris sam-ojn kaj ties amikojn. Niaj ludvesperoj ankoraŭ sukcesas. F-ino Stempel alportis sonbendon kaj ni samtempe ridis kaj lernis dum ni aŭdis niajn proprajn voĉojn. Nederlanda amiko, S-ino Steklenburg, parolis pri sia lando, kaj F-ino Leach pretigis kaj estris tre ridindan konkurson.

En Septembro ni aranĝis piknikon, kaj ankaŭ komencon de nova unuagrada kurso.

Pro ke S-inoj McGrath kaj Sedgley **el nia Ligo estas, ĝis nun, la solaj gajnitaj de la Norma Supera Diploma.** Ni esperas, ke aliaj samideanoj **of en aliaj Statoj sekvos ilin.**

Ni gratulas nian liganon, D-ron Caldera, pro elekto kiel komisiito por la ekzamenoj de la A.E.A.

— J. Hawks.

Ni dankas Pastron C. Cowling pro lia longa kaj valora servo kiel komisiito ekzamena. Malgraŭ ke li bedaŭrinde devis rezigni la oficon pro troa laborpremo, ni estas feliĉaj en tio, ke D-ro Caldera konsentis ĝin preni sur sin. Pri la ekzamenoj adresu al: Dr. C. C. Caldera, 91 Smyth Road, Nedlands, West Aust.

CLARA ELIZABETH STOOP (N. BAUER)

1881 - 1960.

Mortis pro kormalsano 3 Junio, kaj kremaciita. Tabuleto en la Gardeno de Memoro. Multjara Esperantisto, ŝi estis membro de Commercial Esperanto Club kaj Melbourne Esperanto Society. Sia Esperanta taglibro kronikas ek de 1910. En 1919 ŝi edziniĝis. Ŝi donacis £100 al la Pyke Memoriga Fonduso.

PORTUGALO

La Lisbonaj gazetoj "Republica" kaj "Diario de Lisboa" havas novaĵrubrikon pri E-o kaj specialajn artikolojn pri la movado. Tio okazas en lando en kiu antaŭnelonge E-o estis malpermesata!

RECENZO.

"BOFILINO", Romano de Georgi Karaslavov.

Fremdlingva Eldonejo: Sofio. 327 paĝoj, 18/9 Aust., ĉe B.E.A.

Jen verko de unu el la plej elstaraj bulgaraj beletristoj. Temas pri avara kaj kolerema terkulturisto, Jurtalan, kiu neintence mortigas per ŝtonjeto knabon Astarov, kiun li ĉasas for de sia maizkampoj. Li kaj la plaĝa filo Stojko sekrete enterigas la kadavron kaj restas mutaj pri la tuta afero. Poste Stojko edziĝas kun Sevda, nerica kamparanino. De tiam malfeliĉoj venadas al Jurtalan unu post alia. Sevda ne povas naski infanon; la komunumo devige aĉetas plej riĉan terparcelon de Jurtalan, je ties malprofito; pli juna filo Aleksis sin montras maltaŭgulo; Stojko malsaniĝas, kaj mortas. Ruze forpelita el la hejmo de Jurtalan, la vidvino Sveta reiras al sia familio, kio ankoraŭ venigas teruron al la troimpeta bopatro.

Nome en tio, ke Sevda, kolera pro tiu maljusto, sciigas al Jurtalan, ke Stojko, antaŭ sia morto, informis al ŝi pri la murdo en la maizkampoj. Ŝi ĉantaĝe postulas, ke ŝia bopatro donu al ŝi sian plej valoran posedaĵon—La Grandan Kampon. Nepre ne volante tion forcedi al ŝi, li proponas alian teron, sed ŝi ĝin rifuzas.

Firme tenante al sia amata kampo, kerno de lia koro, turmentite preskaŭ ĝis kadukiĝo, li fine decidas anticipi sian denuncan publikan. Li do fabrikas al si nefaktan revizion de la murdosceno asertonte antaŭ la juĝistoj, ke Astarov mortis per falbato kontraŭ arbostumpo, ne per ŝtonjeto, kaj ke nur natura timo pri mortigakuzo devigis lin sekrete enterigi la kadavron.

Tiel decidinte, li malgaje foriras al la vilaĝo, por sin transdoni al la aŭtoritato. Lia sorto restas nekonata.

Povas esti, ke iuj legantoj ĉagrenos pri tio. Tamen la aŭtoro jam finis sian "tezon": nome, ke Jurtalan, mizera homo, motivata ne de pura konscienca mordo, sed de la avareco kaj malamo, sian vivon fine ofertas sur la altaro. Tiajn tragediojn povas fari la homaj malvirtoj. La fino de la romano tial ne estas "lama" aŭ iel manka, sed montras la subtilan artis-

mon de la fama verkisto. Literaturaj perceptemuloj rekonas tiun veron.

La teknika prezento de la libro estas eksterordinare bona, kaj konformas kun la valoro de la tre leginda rakonto, kun ties frapa vortbildaro de la socia medio de kamparanoj en la malnova Bulgarujo.

La traduko de S. kaj A. Simenov estas fluante klara; la dialogoj aparte impresas per sia admirinda kerneco.

Mendu librojn ĉe S-no I. Milligan, 274 Mont Albert Rd., Surrey Hills, Vic. Si kontaktas la vendcentrojn.

"DIALEKTO, DIALEKTIKO"

Delfi Dalmau, Barcelono. 5/6, plus 8p. afranko. Ĉe agento.

Kun tiu nebone elektita titolo, ĉi enmondigis interesan verketon de 88 paĝoj. Temas ĉefe pri la individua diverseco de stilo Esperanta. "Kiom da homoj, tiom da Esperantoj". Pro ennaska personec-vario, karaktero kaj temperamento, la E-istoj, simile ĉe la naciaj lingvoj, sin esprimas per aparte-distingaj lingvaj-konsistoj: ekz., la mildeco de Privat, la firmeco de Lapenna, la saĝeco de Zamenhof respeguliĝas en ilia pens esprimado. Tiu aŭ alia verkanto montras emadon multuzi ironion, hiperbolon, emfazon, pleonasmon, troelipsion, klaran fraz-simplismon, aŭ, male, ornaman belsonoran vortfestonon—ĉiu laŭ sia persona naturo.

Krome Dalmau pipre traktas la neologismojn, la stilimiton, la lingvistikon, la kre-motivojn de Zamenhof, la poliglotismon kaj multalie.

La red., post absorba legado, skribis sur ses folioj privatan komenton pri tiu negranda, sed signifa kaj diskutiga libreto. Havebla ĉe: Mrs. I. Milligan, 274 Mont Albert Rd., Surrey Hills, Victoria.

MUNKENO.

La departemento por Instruado atentigas instruistojn, ke tiu urbe okazas E-kurso sub gvido de la Germana E-Instituto. Anoncis sin 15 partoprenantoj por la elementa kaj 25 por la daŭrigaj kursoj. Ankau en tiu urbo okazas kunlabore kun la movado Pax Christi kurso por katolikoj kun 50 laikoj kaj fratulinoj.—E. Ammann.

W. T. STEAD.

Li naskiĝis 1849, dronis ("Titanic") 1912. Fama redaktoro de The Review of Reviews", per kiu li energie subtenadis E-on per ĉiumonata paĝo en tiu lingvo.

La Encik. de E. informas, ke li E-igis pro paroloj de Prof-o Hartman en Leipzig. Tamen, sur p. 39 "Notlibro de Praktika E-isto" Sturmer nomas lin "pioniro de E-o en Britujo, kiu tamen neniam lernis la lingvon—mi mem vidis leterojn de Couturat al li el jaro 1908 en franca lingvo, kaj kopion de letero lia al Couturat en angla lingvo".

Sed kion tio pravas? Couturat skribis **Franclingve** al Zamenhof (vol. 2, p. 9, Leteroj de Z. (Waringrien).

Ĉu vere ni devas kredi, ke Stead, kiu, lau Ad. Sefer en "Danubo" (Majo 1912) ebligis la enkondukon de E-o en Londonon, donacis monon, pruntis kunvenejojn, fondis la unuan Britan gazeton ("The Esperantist") kaj alimaniere helpis malavare la movadon, tute ne povis uzi mem la lingvon tiel karan por sia koro? Ankau, kiel klarigi la citon el recenzo lia en "The Review of Reviews"? Tie temas pri "Paulo Debenham" (Luyken), kiun originalan E-verkon Stead nomis "ĉarmega romano"! Kiel li konstatis ĝin ĉarmega, se efektive li ne povosciis E-on?

"Oomoto" (Majo, 1951): "Stead alte taksis la Zamenhofan tradukon de Hamleto kaj komentis, ke jam la homaro povas kompreni Hamleton pli bone per la E-a traduko ol per iu ajn alilingva traduko."

POR VIN DISTRI.

"Reedziĝos la 2-an de . . . fr. A.J. kaj fr-ino M.T. . . . (ni) kore gratulas la junan paron". (Dia Regno). Nur preseraro.

Recenzante pri "Sennacieca Revuo", H. A. de Hoog trafis observas, ke artikolinto pri strikrajto en Jugoslavio "uzas dek paĝojn por la simpla rezono:—En nia lando la laboristoj formas la regantan klason. Tiu klaso ordonas kaj respondecas kaj 'suverene decidas'. Oni neniam bezonas striki kontraŭ sin mem, do . . ." (Dia Regno).

Sole en unu parto de Jugoslavio, nome Slovenio, 1124 instruatoj en 34 lernejoj studas E-on; al ili instruas 34 geinstruistoj. Komparu: British Esp-ist, p. 34.

VIRGINO.

En "Pri la Vortfarado en Esperanto" S-ro J. R. G. Isbrucker asertas, ke, laŭ la principo de sufiko, "virgolino" estas pleonasma, ĉar la ideo -ul estas jam entenata en la sufikso -in. Oni do povas simple diri "virgino". Se tiel estas, kaj ĉar "virg-" estas adjektiva radiko, ĉu ni rajtas ankaŭ diri "grandino", "dikino", "blindino" k.c.?

Hazarde, "virgino" similas al radikvortoj en kelkaj gravaj lingvoj: Angla: virgin; Itala: vergine; Hispana: virgen; Portugala; virgem; Franca (adj.): virginal.

La precedenco aprobita de S-ro Isbrucker ŝajnas danĝera, aŭ, pli modere, dubinde imitinda. Provo uzi radikon "virgen" estus preferinda. "Virgino" ne troviĝas en la E-Fr. vortaro de Waringhien.

Zam. uzis "belo" (Hamleto 123) — "Mia belo estis juna dano" — sed povas esti, ke li serĉis rimon por "ĉapelo". Interesa, sed ne esence rilata al la supredirita.

ATENTU! Forte konsilas la Estraro de la U.E.A. interalie, ke en la kampo de informado oni

(1) ne nomu la lingvon artefarita, helpa, verda k.s. Ĉiam nomu ĝin la internacia lingvo aŭ Esperanto.

(2) ne uzu en nacilingvaj tekstoj Esperantajn esprimojn, ekz. "samideano", "Majstro", "verdstelanoj" k.s.

(3) ne nomadu la informadon pri Esperanto "propagando".

Jen nur tri el sep konsiloj en la centra organo "Esperanto" (Julio), al kiuj ni direktas atenton de niaj legantoj.

"SUDA" v. "RONDO".

Which has the longer run? Here's the picture:

La Suda Kruco — July 1920 - October 1934. There are 165 numbers in the collection.

La Rondo—January 1947—continuing. With this number we reach 98. (From Jan. 1958 it has been The

Australian Esperantist.) La Rondo was roneoed from October 1940 to December 1946 (and one quarterly number for 1947).

La UEA bedaŭras, ke ĝi devas altiĝi la kotizojn por la venonta jaro, ĝis: MJ, 19/-; MA, 38/-; MS, 57/-. Al interŝtataj ĉekoj aldonu naŭpencan kurtaĝon.

Dumviva membreco restos je £31/10/- ĝis 31 Dec. 1960. Poste, £38. Pagu kotizojn al via loka deligito aŭ rekte al la ĉefdel., S-ro K. G. Linton, 11 Poplar St., South Caulfield, S.E.8, Victoria.

TRADUKADO.

(1) Ĉiu tradukanto nepre komprenu la tradukotajon.

(2) Povoscio Esperanton. Sciu ne nur la signifojn de vortoj sed ankaŭ la regulojn de la gramatiko kaj la kutimojn de la lingvo. Tion oni lernas nur per ĉiutaga manipulado de la verkoj de Zamenhof, kaj de la du libroj, kiuj sisteme prezentas lian lingvuzon, t.e. la Plena Vortaro kaj la Plena Grammatiko. Neniam publikigu eĉ deklinian tradukon, kiun vi ne kontroligis per alilingva E-isto.

(3) Traduku ne la vortojn sed la sencnon. Gardu vin kontraŭ nacilingvaj idiotismoj, ankaŭ kontraŭ la "falsaj amikoj", nome vortoj similaj aŭ samaj laŭ formo, sed diferencaj inter si pro nacilingvaj sencnuancoj kaj penasocioj. Por elprovi viajn fortojn, traduku pecojn jam tradukitajn de famaj E-istoj kaj komparu, detale, vian laboron kun ilia verko. Nur per imito akiriĝas kvalito.

Por Anglalingvanoj, la Angla Antologio enhavas plurajn poemetojn taŭgajn por tiu ekzerco.

—Laŭ "Eseoj" (Waringhien) p. 48-67.

LA VORTOJ EN LA BIBLIO.

La Biblia hebrea lingvo estas unu el la plej malriĉaj lingvoj, kaj en kalkulas nur 5,642 vortojn. La Nova Testamento, kiu ampleksas unu trionon de la Malnova, entenas tamen 4,800. Estas do stranga fakto, ke la tuta Angla Biblio de 1611j. enhavas iom malpli ol 6,000 vortojn, el kiuj ne pli ol 200 estas iasence arkaikaj

(G. P. Marsh: Lectures on the Eng. Lang., 1885 edn.). Tie temas pri apartaj, diferencaj vortoj.

La nombro de presitaj vortoj, unufoje aŭ ripete uzitaj, en la Biblio Angla estas proks. 770,000, laŭ "The Life of Sir Isaac Pitman", p. 347: eld. 1908.

FOR ASIANS TOO!

By its logic and facility, Esperanto belongs not only to Europeans but also to Oriental peoples. For five or six years I learned English, but I still cannot write even a simple letter in that language. My own experience confirms the words of Zamenhof: "An art language is at least 50 times easier than a natural one." (1) It would be a naive enterprise to try to construct an idiom that would resemble all of the thousands of tongues in existence. Esperanto is designed to be an **auxiliary** language, not a universal one.

I learned Esperanto in my spare time as a cultural aid, and can now read freely anything written in it. It has immensely enriched my life. If the learning of one national language opens a window, Esperanto has for me opened all windows on the world.

—Wang Chong-Fang, Harbin.
(Heroldo de Esperanto, 1 June. Translated from Esperanto.)

(1) P. 293, Fund. Krest. "Lingvo arta estas almenaŭ 50 fojojn pli facila, ol natura." Also p. 288.

THE PYKE EXAM.

is set for January 21 or within four days either side of this date.

NOTO PRI LA LITERATURO DE NOBLA MALĜOJO.

Estas speco de imaga literaturo, kiu ĉefelemente havas la temon de sinofero, rezignacio, abnegacio, personeca mem-forviŝo pro amo al alia aŭ aliaj homoj. Ekzemple; La Miz-

eruloj (Hugo); La Klostrejo kaj la Kameno (C. Reade); Rakonto pri Du Urbegoj (Dickens); Marta (E. Orzeszko); Releviĝo (Tolstoj).

Tiuj verkoj forte emfazas tiun animstaton. Kun intensa virtuoza la majstroj pentras amantajn homojn en profunda kordoloro, paŝantajn, kun sangaj piedoj, laŭ la roka vojo de l'sinforĝesado.

Pri "Marta". Per ĝi ni vidas la poioman degeneriĝon de purmorala virino sub premo de maljusta socia sistemo; ŝian grandigantan sinoferon sur la altaron de l'neceseco; ŝian amon al malsana infano, al kiu fine mankas la elementaj bezonoj de l'vivo. La ordona voĉo de l'malsato, ne plu rezistebla, devigas ŝin aŭferdoni sian honeston aŭ vendi sin sur la pavimoj. Ŝi dolore akceptas la unuan alternativon, kaŝe premas sub siaj ĉifonoj libron ŝtelitan de sur butikbreto, blinde kuras laŭ homplena strato en densan trafikon — frakasa kolizio kun veturilo: jen fino al ĉiuj ŝiaj problemoj.

Ĉiu situacio en la malgaja rakonto kreigiĝis por atingi unu celon — forĝi armilon por disbati la indiferecon kaj memkontenton de la sennombraj homoj, kiuj ignore preterpasas sociajn marĉojn, kies fiordonon paliativaj neniel povas modifi — fetorajn lokojn ne vidatajn de vivĝuuloj, kies kurioza moralo ebligas al ili, ne vidi la malbelan, la anime perturban, kio deprenus de ilia komforto kaj bonstato.

"Marta" portas en si ateston pri sia tempo kaj socia kondiĉaro. Tamen multo en ĝi ankoraŭ validas: revestita en la lingvaĵo de la aktuala, ĝi povus respeguli aspektojn de vivo en iuj ankoraŭ ne tre evoluintaj socioj.

Rimarkoj: Vivo de Orzeszko: Senacieca Revuo, Aprilo 1939. British Esperantist, Septembro, 1910; La Revuo, Augusto 1910. "Esperanto", p.125, 1924. La rakonto estas skize resumita de D-ro Noel en Lingvo Internacia, Parizo, Junio 1910.

127 JAROJ !

1789: Franca Revolucio — 1918: Germana Revolucio.

1804: Napoleono—Imperiestro! — 1933: Hitler—estro de Germanujo.

1809: Napoleono en Vieno — 1938: Hitler en Vieno.

1812: Napoleono antaŭ Moskvo — 1941: Hitler antaŭ Moskvo.

1813: Napoleono decidige malvenkis ĉe Lajpcig — 1942: Hitler decidige malvenkis ĉe Stalingrad.

1816: Napoleono sur Skta. Helena — 1945: Hitler venkita, mortis.

—"Oomoto".

SKRIBE ESPRIMU VIAN PENSADON!

Estus bone, se ekzistus ĉe ni simplaj homoj pli forta inklino al subjektiva esprimado de la penso. Ni posedus trege interesan kolekton da vivspertaj historioj, se eĉ la plej nerimarkindaj homoj inter ni volus surpaperigi pri tio, kiel ili pensas pri la vivo kaj laboro, pri la religio, amo kaj emocio.

Tiuj, kiuj kutime skribas por si taglibrojn aŭ notlibrojn pri siaj spertoj, ordinare limigas sian kampon al eksteraj kaj nepersonaj impresoj, kaj al priskriboj pri aferoj pli-malpli banale ĉieskonajaj. Ili ne sin submetas al pensa memdisciplino, per kiu ili povus kulturi en si kapablon, esprimi kion ili pensas kaj sentas pri la vivo kaj ties signifo por ili. Povas esti, ke, konversaciante, ili lasas montriĝi iom da sia pli profunda memo—sed nur malofte; skribante, ili preskaŭ neniam lasas ĝin aperi.

Al nia propra mensa disvolvigo tre helpas tio, ke ni sincere esprimas per skribo kion ni sentas, esperas aŭ kredas. Ĝi klarigas nian elrigardon sur la vivon, retenante kion ni kredas esenca, kaj forigante kion ni nur pasive akceptis bazitan sur nenio alia ol la sociaj konvencioj.

Por taŭge komenci tiun disciplinon, skribe resumu iun paroladon aŭskultitan de vi ĉe preĝejo aŭ kunveno. Fininte tion, sube esprimu vian propran opinion pri la parolado kaj aldonu rilatan aŭ konfirman materialon, se vi povas. Poste, pliampleksigu tiun skribekzercadon, elektante iun temon pri kiu vi pritraktos, trafte kaj klare, ĉion, kion vi havas en la penso, aŭ, minimume, ĉion, por kio vi trovos gustajn vortojn.

Per tiu paciencia meminstruado vi ricevos mastrecon super la subtila kaj malfacile esprimebla penso, kaj sentos en vi la plezuron de la pura kreado, en tio, ke vi donas formon kaj daŭrecon al mensaj bildoj, kiuj alie pasus en forgesitecon kun viaj ŝanĝiĝantaj animstatoj kaj nebuliĝanta memoro.—F.R.B.

JUNULOJ.

Skribu al: Margarita Georgieva (13-jara), str. Arda 3, Vratsa, Bulgaria. Hiĉ Grigorov Jeljavski (14j), str. Republika Rab. jiliŝta Bl. 6, kv. Nadejda, Bulgaria.

"CHICAGO DAILY NEWS."

We pith down a 9-inch report with photo and spread heads in issue of June 28: International Language at Fair. Esperanto adds up to sales. Indonesian Uses It Here.

Don't ask Mrs. Datoe Tomeng-goeng at the Chicago Trade Fair: "Is Esperanto a dead language?" She now has a world-wide export business, partly because she learned Esperanto in 1951, since when she hasn't had any trouble anywhere she's been—round the world eight times selling batik cloth. President of the Indonesian Esperanto Asocio and head of the Djakarta Trade Fair, she has, by her Esperanto-based sales talk, landed many orders, including one for 28,000 yards. "Esperanto works," she says simply.

LANTI.

Lanti, genia, eskplodema,
cinika, tamen simplanima,
jen gaja, kun esper' senlima,
jen drone en turment' ekstrema.
—Joab Eliot.

Sole en unu parto de Jugoslavio, nome Slovenio, ~~124 instruatoj en 34~~ lernejoj studas E-on; al ili instruas 34 ĝeinstruistoj. Komparu: British Esp-ist, p. 34.

DANLANDO.

La komunumestraro Kopenhaga prove enkondukis E-on kiel bazan lingvon por la studo de fremdaj lingvoj. En la 4a lerneja jaro oni komencas instrui E-on, kaj tio estas daŭrigata en la 5a. Nur poste komenciĝos lerno de aliaj lingvoj, sed ankaŭ tiam E-o ne estos forgesata. Oni regule ĝin uzos ĉe geografo kaj div. aliaj fakoj—kaj certe ankaŭ por internacia korespondado.

EN BULGARUJO.

La oficistoj en Bulgarujo ricevas salajroaldonon de 10%, kiam ili posedas diplomon pri fremda lingvo, se ĝi estas uzata en ilia oficejo. Al tiuj lingvoj nuntempe apartenas ankaŭ Esp-o, kaj jam submetis sin al ekzameno unu el la gvidantoj de Radiostacio Sofio, la redaktoro de la humura gazeto "Starŝel" kaj la teknika redaktorino de "Nuntempa Bulgarujo".

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15\$ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5\$.



Editor: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

No. 19 (99)

MELBURNO

Decembro, 1960

SCIENCE AND THE LANGUAGE PROBLEM

Babel Bars Free Transmissioun of Research

Scienca gazeto "Discovery" vol. 26, n-ro 6, enhavas artikolon "Scienco kontraŭ Babelo (de J. Jackson) en kiu la aŭtoro pritraktas la lingvan problemon vidpunkte de la sciencistoj. La enigmo pli akriĝas, precipe pro pligravigo de la Soveta scienco. Nur 2 elc. de Britoj kaj Usonaj sciencistoj havas scion pri la rusa lingvo; almenaŭ 50 elc. de la monda literaturo scienca estas verkata en lingvoj, kiujn pli ol duono de la sciencistoj ne povas legi.

Jackson opinias, ke, en la nuna naciisma epoko, kaj pro la ĉiam pli signifiga rolo de Rusujo kaj Ĉinujo, la angla lingvo ne ricevas ĝeneralan akcepton kiel ilo scienca. Li konsideras tri eblojn: (1) Pli da tradukoj. (2) Lingvaj kursoj por sciencistoj. (3) Uzo de modifita aŭ sinteza internacia helplingvo.

La unuan li rifuzas, kiel tro multekostan, temporaban, tro fakulmankan. Li duan li praktike favoras, por fronti urĝan situacion. La trian li teorie aprobas kiel idealan solvon, sed dubas pri efektiveco de la ideo, ĉar la koncernaj instancoj indiferentas.

Sintezo aŭ planlingvo ne elvokus naciisman paŝion; ĝi estus facile lernebla. Li nomas Esperanton kaj Interlingua kiel la ĉefajn projektojn, rimarkante, ke ses sciencaj gazetoj en Japanujo iufoje uzas Esp-on, kaj resumoj en Interlingua aperis en Usono. Li tamen kritikas "Europe-

bazitajn" (t.e. ĉefe Latinidajn) projektojn, pensante, ke ilin ne facile komprenus ne-Eŭropaj sciencistoj; iom nekonekvence li favoras Interlingua (de Hogben), principe bazitan sur nur grekaj radikoj.

Ni komentas: Multaj eminentaj E-istoj malkonsentus, ke Interlingua (IALA) estas la ĉefa konkuranto de E-o en la planlingva kampo. Fakte, Esperantologoj ĝin praktike ignoras; male ili multe verkis kritikojn (ekz. Waringhien, Manders, de Bruin, Solzbacher, Collinson) pri alia projekto—Interlingue (Occidental), multilate pli atentinda ol la usona Latinidajo.

Ne prava estas la implico, ke Interlingua superas E-on pro hipotezo, ke ĝia teknika-scienciga vortaro estas pli facile legata de fakuloj. Jam lerninta pri iaj simplaj ortografiaj ŝanĝoj, sciencistoj certe povus legkompreni terminojn en E-o. Ekz., vidu nur la "Medicinan Vortaron" de d-ro Briquet (1932) kiu svarmas je facile komprenataj grek-radikaj vortkombinaĵoj.

(Vidu: "A.E.", Okt.-Nov., 1959.)

If a scientist today wishes to follow developments in his field he must first learn, at least to read, six or seven languages at lowest. This presents for most of them a time-robbing preparation for a scientific career and an unproductive charge on the brain. Failing fulfilment of

this task, such men must give up all expectation of understanding the vast number of publications appearing in the chief languages or pay for costly translations of them.

As to the publishing of tractates, studies, &c., scientists whose own language is English, French or German are privileged to a degree. They simply write in their mother tongue, aware of a vast reading field. Sometimes they give a resume in one of the other languages, but for Scandinavians, Finns, Dutchmen, Japanese, &c., is posed the problem either of writing in a foreign tongue or of paying for translations if they wish their publications to be widely understood outside their fatherlands. Furthermore, even those who speak and write well enough in a foreign language must arrange for competent revision of their manuscripts before publication, for no one uses with perfect correctness a language not his own.

This situation entails for scientists in small countries a great loss of time and much mental work and expense, all of which is spared their colleagues privileged by a widely used, and so favored, medium of expression. As a consequence their output of scientific work is reduced; their active life is in effect shortened, and with it their chances of international recognition in their chosen field.

URUGVAJO.

La E-Societo, Yaguaron 1397, Montevideo, eldonis ŝlosilon de E-o por hispanlingvanoj, honore al D-ro Zamenhof. Gisdataj informoj kaj adreso. I resp. kuponon.

Sameldoneje ni ricevis 264-pagan verkon de Carlos Vaz Ferreira, fama Urugvajja filozofo. Recenzo aperos.

Melb. "Herald" 27.10. informis, ke la Nederlanda Edukministrejo proponos antaŭ la parlamento, ke E-o estu sendeviga lernobjekto en cjoj de progresinta elementa edukado.

SEZONA SIGNIFO.

Kristnaskfeston ni honoras ne per himnoj dolĉmuzikaj, nek donacoj alamikaj—
Nur servante Lianome ĉiajn "fratojn" ame-home, ni la Kriston vere gloras.

Australia Kroniko

MELBOURNE: Jus reveninte post ferio en Norda Kvinlando, D-ro A. Fridenbergas denove viktimitigis por nia programo (14/9), kaj ege interesa estis lia rakonto pri la longa veturado tien, la ruĝa strangeco de la brulanta kamparo dum la sukerrikoltado, la tropika beleco kaj, antaŭ ĉio, la vasta malpleneco de tiu plej norda Aŭstralia Stato. Serĉante la sunon, li fuĝis el malvarma Viktorio, sed en Nov-Suda Kimrujo ankoraŭ frostis kaj akvoindujtoj baris la vojon kelkloke. Alveninte en Kvinlando, jam en Brisbano li elreviĝis pro daŭra manko de varmeko. Feliĉe pli norde plifortigis la sunradioj, plialtigis la temperaturo, kaj kune kun la filino la fuĝinto naĝis, sunbrunigis kaj tre agrable regalis sin per la multaj surlandaj kaj submaraj mirindaĵoj de la tropiko.

Antaŭ ol prezenti siajn kolorkliŝojn pri Jugoslavujo (21/9), S-ro Ryding priskribis sian vojaĝon tra tiu tre interesa lando; kaj montris per mapoj la urbojn vizititajn. Inter la poste montrataj bildoj troviĝis, krom interesataj el pluraj urbegoj—Trieste, Ljubljana, Zagreb, Sarajevo, k.a.—multaj belegaj pejzaĝoj kun verda-verda kamparo kaj pitoreskaj farmdomoj. Speciale pitoreskaj estis la akvofaloj ĉe Plitziĉe. Interese estis ankaŭ du urbetoj, Budva kaj St. Stefan, iamaj fortikajoj, sur (nun duon-)insuletoj, starantaj sen ia ĉirkaŭa tereno, kvazaŭ nur kreskintaj el la akvo. Aliaj interesaj inkluzivis mallarĝan malluman straton ĉe Dubrobnik, tipan pri multaj urboj, kaj la kolorplenaĵ okulplaĉaj cilindro-formaj tegoloj sur multegaj tegmentoj.

Por aldoni al la intereso, S-ino Ryding kunportis diversajn memorajojn—ceramikan trinkbotelon por infano, kaj manĉizitajn lignoteleron, forkon kaj kuleron proprajn de tiu lando.

Ankoraŭ unu reveninta vojaĝanto estas F-ino Amy Godfrey, kiu rakontis (28/9) pri vizito al Ayers Rock en Centra Aŭstralio. Kun kelkaj aliaj kuraĝuloj ŝi vojaĝis tien kaj, krom ke ili veturis aŭtomobile, preskaŭ kiel pioniroj ili devis vivi, ĉar ankoraŭ tute virga kaj preskaŭ senhoma estas la plejgranda parto de

tiu regiono. Polvo abundas, sed akvo por forlavi tion tute mankas, kiel ankaŭ hoteloj por sin refreŝigi aŭ ripozigi survoje. Tamen la "esplorantoj" opinias ke la multaj interesajoj de la vojaĝo, la kolorplena beleco de la regiono kaj la impona strangeco de tiu plej granda, balen-simila, unuopa rokego bone kompensis la malkomfortojn de la entrepreno. La vojaĝo laŭiris nun-faman Woomera-Raketejon kaj kondukis ankaŭ al Coober Pedy, minejo por opalo.

Novan intereson vekis S-ro K. Linton (5/10) per sia traktado pri poezio. La Elegio de T. Gray verkita en Kampara Tombejo provizis belan kaj bone-konatan ekzemplon, dum la provoj al analizo kaj traduko estis bonega ekzerco por la ĉeestantaro, kiu pro tio des pli alttaksis la artan tradukon de William Auld dum posta komparo.

Je 12/10, S-ro F. R. Banham parons pri "La Problemoj pri Varbado". La problemoj kiujn frontas la Esperanto-Movado hodiaŭ, li diris, estas la samaj, kiujn frontas ĉiuj aliaj kulturaj organizaĵoj. Troa laborado al-lasas malmulte da tempo por kulturaj aferoj, kaj samtempe obligas al kiron de multaj luksaj posedaĵoj (ekz. aŭtomobilo, televida aparato), kiuj siavice postulas pli da tempo. Tamen restas ankoraŭ fekunda grundo. Homojn trispecajn oni povas allogi al Esperanto—(1) raciistojn (aŭ realistojn), kiuj vidas aferojn kiel ili estas; vidas en Esperanto eblan solvon de la lingvo-problemo, kaj ĝin akceptas tiel; (2) idealistojn, kiuj kredas ke per Esperanto oni povos plibonigi la homaran sorton kaj la mondsituacion; (3) lingvoamantojn, kiuj povas taksii la kvalitojn de Esperanto laŭ pure lingva vidpunkto. Pripensante ĉi tiajn varbotojn, S-ro Banham donas saĝan konsilon al varbotoj. Unue fariĝu mem sperta uzanto de la lingvo. Neniu povas bone imponi pri la lingvo nur balbutante. Due, ne misrepresentu la faktojn, ekz. ne troigu la ĝisnunan progreson de Esperanto, kaj ne tro emfazuu la facilecon de la lingvo.

Inter aliaj "Novajoj el Esperantujo", S-ro H. Koppel resumis (19/10) raportojn pri la ĉi-jaraj grandaj mondkongresoj—la 45a Universala E-Kongreso en Bruselo (Belgujo) kaj la 33a SAT-Kongreso en Aarhus

(Danlando). En Bruselo, oficiale reprezentis A.E.A.-on S-ro Frank Taylor (Albury), kiu partoprenis kune kun edzino kaj nome de A.E.A. salutparolis ĉe la Solena Inaŭguro. Ĉeestis ankaŭ Ges-roj I. Maddern kun 3 filinoj. Ĉe la SAT-Kongreso, F-ino A. Humphries (Melbourne) renkontis 3 ges-anojn bone konatajn al Melburnanoj—F-inon Rita van Rijswijk (Nederlando), S-ron Petron Dikštejn (Svedujo) (iamajn Melburnanojn) kaj S-ron Lindkvist (Svedujo), kiu iam vizitis Aŭstralion kiel maristo.

Pluan pensinstigan prelegon faris S-ro L. Thomson (26/10) pri "La Evoluado de la Homo kaj de la Mondo". Laŭ ties filozofio (se vere oni ĝuste ekkaptis ĝin), la homo jam progresis tra kvar etapoj—de senviva ŝtono al planto—al besto—al homo. Alia interesa teorio temis pri la progreso de la mondo el la "Tronoj" tra kondiĉoj kiel "Malnova Saturno", "Malnova Suno", "Malnova Luno" ĝis la nuna "Mondo" kaj ĝia estonta reirprogreso laŭvice tra kondiĉoj kiel Jupitero, Venuso kaj Vulkano.

Escepte ke ĉi-foje ĝi traktis poemon de Robert Burns ("For a' That"), la leciono de S-ro K. Linton (2/11) nur ripetis la pasintan, sed malgraŭ tio la intereso estis, se eble, eĉ pli granda ol unuafoje. Granda estis ankaŭ ĉies admiro por la majstra tradukado kiun verkis R. Rossetti.—F.K.

RENDEVUO: Pri "Famaj Trompisto" prelegis D-ro A. Fridenbergs (29/9). Li pritraktis tri filulojn el la 18a jarcento, kiuj ne nur akiris famon pro trompado, sed, malgraŭ tio, estis tre popularaj inter siaj samtempuloj.

Casanova estis itala aventuristo kies kariero de intrigo kondukis lin al multaj Eŭropaj urboj kaj rezultis laŭvice en alta rango kaj leĝaj procesoj. Li poste akiris famon pro sia memuaro pri amaferoj.

Baron Munchhausen estis germana soldato, kiu servis kun la rusa armeo kontraŭ la turkoj, kaj poste ravis siajn aŭskultantojn per fikciaj rakontoj pri siaj aventuroj.

Count Cagliostro, itala ĉarlatano kiu naskiĝis sub alia nomo, multe vojaĝis kaj estigis sin kiel specialiston pri okultismo. Pro intermiksiĝo en intrigo pri diamant-kolĉeno (laŭdire mendita de Marie Antoinette, sed vere de falsistoj) oni lin malliberigis en la Bastille. Lin denove malliberi-

gis la Inkvizicio ĉe Romo, sed ties mortkondamno poste ŝanĝiĝis al ĝismorta mallibereco.

Tiuj trompistoĵ estis proksimume samtempuloj, kaj la fakto, ke, malgraŭ sia fieco, ili akiris tiom da popularo, montras, ke ili vivis dum periodo de degenero, kiesproduktaĵoj ili estis.

La oktobra Rendevo okazis en la Melburna Esperanto-Domo (10 The Crofts, Richmond), kie ĝi ekde nun ĉiam kunvenos ĉiun lastan vendredon de la monato. La parolanto estis S-ro J. Ryding, kiu montris pluajn lumbildojn pri sia vojaĝo tra Eŭropo. Ĉi-foje li limigis sin al Aŭstrujo kaj Germanujo. S-ro Ryding multe laŭdis la gastamon kaj helpemon de la Vienaj E-istoj, kiuj kondukis lin kaj la edzinon ĉirkaŭ sia urbo; kaj speciale interesa por S-ro Koppel estis lia rakonto pri vizito al Klubo "Harmonio", kaj renkonto kun ĝia Prezidanto, S-ro Emil Vokal, amiko de S-ro Koppel kaj kunfondinto de tiu Klubo (antaŭ 25 jaroj).

NOVAJ E-"STELOJ" APERIS EN MELBURNO.

Inter la multaj artistoj de la nuntempa Tivoli-prezentado, "Ziegfeld Follies", troviĝas Esperantista paro—geakrobatoj "Uelk kaj Maor". La edzo, babilema, sed modesta franco ("Uelk")—pli bone scipovas la lingvon ol lia ĉarma germana edzino ("Maor"), kiu multon komprenas sed preskaŭ nenion parolas. Tamen nur novaj varbitoj por Esperanto ili estas, kap ilia renkonto kun Esperantistoj en Sydney estis la unua kun E-istoj ĝenerale, ĉar S-ro "Uelk" nur private kaj lastatempe instruis sin mem. Sendube post mallonga tempo ili estos eĉ pli spertaj ol nun.

Ilia restado en Melbourne daŭros ĝis Februaro, kaj malgraŭ diversaj malfacilaĵoj—ilia sola libera vespero kompreneble okazas dimanĉe, sed Ho ve! ne funkcias trajnoj en Melbourne dimanĉe—oni esperas plurfoje gastigi ilin. Jam okazis la unua renkontiĝo. Dimanĉon, 16an de Oktobro, du aŭtomobilistoj, S-roj McKenzie kaj Fridenbergs, rondveturigis la vizitantojn kaj aliajn al Silvan Dam kaj Lilydale. Manĝo kaj haltejo por vespera interbabilado troviĝis en la domo de Ges-roj Koppel.—F.K.

KOREKTO.

Ĉar "The Australian Esperantist" havas internacian cirkuladon, kaj kompetentaj legantoj povus nee skui la kapon, legante en la gazeto (paĝo 87, 1960) la raporton pri mia prelego, "Rusa Promenado", mi petas korekti ĝin tiu ĉi rilate:

- (1) Ne la opero, sed la **poemo**, "Jevgeni Onegin", estas la verko de la rusa poeto, A. S. Puŝkin; la muziko estas de Caikovski.
- (2) Puŝkin ne estis "Rusadoptita"; la fakto, ke la patro de lia avo estis negro, kiun kiel infanon oni donacis al la rusa caro, Petro la Granda, kaj kiu poste fariĝis konsilanto de la caro, neniel influis la subjektivan kaj objektivan apartenon de Puŝkin al la rusa popolo, ĉar rasan problemon en Rusujo oni neniam konis, en senco de apartiĝo.—A. Fridenbergs.

LA "AŬSTRALIA KRONIKO" 1957 - 1960.

La fino de la jaro estu bona okazo por revui la raportadon flanke de la kluboj dum la jus pasinta jaro.

Aperis en 1960 ses numeroj de nia gazeto. En ili aperis el Melbourne 6 raportoj, el Hobart 4, el Sydney kaj Perth 3, el Brisbane 2, el Canberra kaj Adelaide nenia. La silento de la iam tre vigla Canberra grupo estis iom surpriza.

Interese estas ankaŭ kompari la ĉi-jaran statistikon kun tiu el la pasintaj 4 jaroj (1957-1960). Dum tiu periodo aperis 25 ekzempleroj de nia gazeto. En ili aperis el Melbourne 22 raportoj, el Sydney 18, el Brisbane 14, el Perth 13, el Hobart 11, el Canberra 9, el Adelaide 4.

La regula raportado pri la agado de la aŭstraliaj kluboj estas grava fakto de nia gazeto. Aŭstralia E-gazeto kiu ne raportas pri la aŭstralia E-movado ne meritas ekzistorajton. Aktivaj kluboj nepre havu la ambicion ofte raportari pri siaj agadoj kaj tial havi elektitan komitatano kiu regule prizorgas tiun gravan laboron. En tiu spirito ni esperas ke simila statistiko je la fino de 1961 povos raportari pli bonan rezulton. Sendu raportojn pri viaj Zamenhof-Festoj al A.E.A., Box 2122T, Elizabeth Street Post Office, Melbourne.

ZAMENHOF FESTO

en Melburno okazos sabate

17 Dec. je la 7.45 vespere

ĉe "Esperanto House"

10 The Crofts, Richmond

(for de 235 Punt Rd.)

Fest-Parolado:

S-ro F. R. Banham

MORTIS**Prof. D-ro Giorgio Canuto.**

Subite forpasis en Torino la 29-an de Okt. 1960 la Prezidanto de U.E.A., Prof. D-ro Giorgio Canuto. La perdo de tiu eminenta personeco kaj sciencisto signifas grandan baton por nia tutmonda movado.

En la nomo de U.E.A. D-ro Ing. G. Azzi ĉeestis la funebran ceremonion kaj metis florkronon sur la tombon.

"Into the School" Appeal.

Further donations received: Miss Flora H. Kemp (Melbourne), 14 books and booklets and £3; Malvern Esperanto Group (through Miss A. Paling), £1; Mr. & Mrs. Koppel (Melbourne), £3. Many thanks. Please do not forget the conditional offer of Mr. R. L. Cecil and Dr. F. Williams (both Melbourne) to donate £10 each, provided three other Esperantists or Clubs donate similar amounts.

ASOCIAJ EKZAMENOJ.

Nia Asocio starigas ekzamenojn pri Esperanto-lingvoscio antaŭ pli ol ok jaroj laŭ tri kategorioj: Elementa, Supera kaj Klereca normo. Gis nun malmultaj anoj profitis la avantaĝon proponatan de de Asocio kaj ŝajne nur en Okcidenta Aŭstralio sin prezentis kandidatoj! Posedas la Elementan Diplomon: S-no A. B. Sedgley, S-no R. McGrath, F-no A. Longson, F-no D. Leach, S-no E. Pianta, S-ro W. L. Illingworth, ĉiuj membroj de Okc. Aŭst. E-Ligo.

Posedas la Superan Diplomon: S-no R. McGrath, S-no A. B. Sedgley. Posedas la Klerecan Diplomon: D-ro C. J. Caldera.

Orientanoj! Ne lasu monopolon de la ekzamenoj al la Okcidentanoj. Petu informojn kaj specimenajn paperojn de la Komisiito: Dr. C. C. Caldera, 91 Smyth Rd., Nedlands (W.A.).

Recenzoj**VIRINO ĈE LA LANDLIMO.**

Drametoj kaj Skeĉoj de Marjorie Boulton. Koko. Kopenhago 1959. 196p. Bindita. Aŭstralio prezo 17s.6p.

En sia antaŭparolo la aŭtorino aludas interesan fakton. "Nia literaturo, tiel mirinde riĉa je poezio, tiel estiminde riĉa je romanoj kaj noveloj, estas eĉ strange malriĉa je dramoj." Do, oni ricevas impreson ke eble, pli ol natura inklino, la deziro plenigi mankon decidigis ŝin elekti ĉi tiun aparte malfacilan verkformon. Felice ŝi estas tre fekunda verkisto. Alie oni eble domagus ŝian portempan forlason de la kampo de la lirika poezio en kiu ŝi tiel ravas nin. Sed tiuj el ni, kiuj longe kaj eĉ vane devis serĉadi pecon taŭgan por prezentado aŭ legado ĉe grupo, tre dankos pro ŝia entreprenemo.

Celante kontentigi grandan diversecon de bezonoj kaj preferoj, la kolekto ampleksas drametojn tre variajn laŭ tipo, temo kaj stilo.

La unuakta tragedio "Virino ĉe la Landlimo", kiu liveras la titolon mem de la libro, estas unu el kelkaj pli pretendaj pecoj kaj premiigis en la Belarta Konkurso de U.E.A., 1957. Ĝi temas pri amo inter juna paro el apudaj landoj, kaj la tragikaj sekvoj kiam Mateo, jaluza samlandano de la knabino Maria, volas profiti la ekplodon de milito inter la du landoj por disigi la geamantojn.

Alia poezia dramo: "Ĉe l' Akvo de Forgeso" baziĝas sur la konata legendo pri Orfeo kaj Eŭridiko. Legendo el antikva Hindujo provizas temon por la lirika dramo: "La Morto de Kabir". Du unuaktaj tragedioj temas respektive pri streĉitaj rilatoj inter instruistinoj, kaj lastaj tagoj de la Naciliberiga Milito en Jugoslavio. Pluraj pecoj pli-malpli malseriozaj temas pri la Universalaj Kongresoj kaj la esperantista vivo generale. Entute 15 drametoj de tre kontentiga varieco; liŭgvaĵo elstara pro gramatika korekteco kaj tuja komprenebleco; bonegaj presoj kaj bindo. Jen libro vere havinda por ĉiu E-grupo kiu celas paroligi siajn anojn.

—R. McGRATH.

Plena Gramatiko de Esperanto: K. Kalocsay, G. Waringhien. Tria Eldono: Esperanto-Propaganda Centro, Milano, 1958. Unua kajero, 181p.

(126 paragrafoj). Prezo po kajero 17/6 Aŭstralia. Ĉe agento.

La aŭtoroj intencis, ke la dua eldono estu definitiva, sed, poste, diversaj motivoj pelis ilin fari trian. La dua eldono plu ne estas havebla, do represo estus necesa. Ili kaptis oportunon por ree tralabori kelkajn ĉapitrojn, fari malgravajn korektojn en aliaj kaj enmeti multajn aldone-tojn. La Zamenhofajn ekzemplojn ili ĉie plimultigis.

Unu grava afero certe igis trian eldonon dezirinda, nome la malekvilibro kaŭzita de la kreskinta influo de germanlingvaj (nord-Eŭropaj) E-istoj sur la lingvan evoluon de Esperanto, interalie pro la (devigita) malpliigo de slava (kaj alilingva) kunlaboro. Certaj trajtoj diferencigas la germanajn lingvojn disde la aliaj Eŭropaj lingvoj, kaj disde Esperanto. La aŭtoroj do penas prezenti "antidotojn" al tiu tro unuflanka tendenco.

Malfacilas uzadon manko de detala indekso, kiu aperos nur kun la tria, kompletiga, kajero verŝajne atendota iom longe. La presado estas tre bona, la kompostajo perfekta.

La "Gramatiko" estas riĉa komentario pri la lingvuzo; ĝi dense donas citaĵojn el la literaturo kaj helpajn sugestojn pri pli klara esprimo kaj bonstila frazturno. Esp-istoj devus senti ĝian mankon samangore kiel ili sentus mankon de dom-ŝlosilo.

Nepalo Malfermas la Pordon: Tibor Sekelj. Leksikologia komentario de J. Regulo Perez. 232p. 3 dol. U.S. Eld. Stafeto.

La aŭtoro, elstara E-isto kaj geologo, pasigis ses monatojn en Nepalo, kiu sperto ebligis al li penetre kaj penetre verki ĉi-libron, modelon de akuta observemo kaj plastika esprimo. Krom la ĉiaaspekta priskribo de tiu pra-mora lando, ni havas tre utilan glosar-komentaron kaj 12 kolorfotojn, 38 nekolorajn.

La budhismo kaj la hinduismo, kun siaj multaj sektarioj, interese okupas tiutem-emajn legantojn; la diversaj gentoj estas priklarigitaj historie, socie, laborokupe, ideo, — ilia arto, folkloro, religiaro kaj punkodoj — per informoj mirigaj kaj iufoje ŝokaj. Naŭze abomena estas bildo ĉe p. 112. Ĝi montras senkapigon de bovido pro ia religia rito ofera; sanga glavo

jam traranciĝis la kolon de la kompatinda besto, kaj rapida ekfoto permesis, ke ankoraŭ la kapo ne falis. Nur ruĝa streko indikas la vundspacon. Unu sektulo, turmente tenante la voston, sadisme ridaĉas pro la senhela doloro de la muta viktimo. Ke ankaŭ piaj Hebreoj kaj tielnomitaj Kristanoj en pasintaj jarcentoj kaj ankoraŭ nun faradis tiajn fi-agojn, devas moderigi la indignon de komprenemaj malaprobantoj.

Diskuti la verkon lau ĉiuj detaloj postulas spacon de tuta numero. Sufiĉas diri, ke ĝi prenas lokon inter la plej bonaj en sia speco. Inter la tromultaj neologismoj de nia poligloto: arida (kombinuancaĵo: seka, senarba, malfertila kaj dezerta); precepto (regulo, moralordono, -instruo, leĝo); poneo (A. pony: malgrand-speca ĉevalo). "futbalmatĉo de la... teamo" tradukiĝus per "piedpilkkonkurso de la... ludantaro". Esperanto ne estas Angla piĝino.

Jam antaŭ sia apero la verko estis tradukita el la E-a ms. en la Anglan, Serban, Slovenan kaj Hispanan.

En la postparolo kaj mapo kelkaj landnomoj kaj aliaj geografiaj nomoj ne koincidas kun tiuj donitaj en la libroteksto. Tio okazis, ĉar la eldonisto kaj la pres-prizorganto — pro teknikaj kialoj — ne submetis al la kontrolo de la aŭtoro la postparolon kaj la mapon, en kiuj ili allasis siajn personajn opiniojn. Espereble la tuto ĝustigos en venonta eldono.

SUD-TIROLO.

Hugo Steiner (Internacia E-Muzeo, Hofburg, Vieno) dolore sentadas la Italigon de tiu parto de antaŭa Aŭstrio. Li eldonis broŝuron vaste senditan al diversaj gravaj instancoj kaj centroj. Sur 63 paĝoj li penis dokumenti la tutan aferon, jam de 1918 ĝis nun. Li riĉe citas voĉojn de famaj homoj, kiuj kondamnis ia anekson, registarajn kaj jurnalajn deklarojn, kaj raportas la intertraktojn inter la koncernaj partioj.

Li sarkasme rimarkas, ke Italujo donis al Somalio la memstarecon, sed ankoraŭ rifuzas aŭtonomion al la Suda Tirolo.

Nia gazeto estas principe neŭtrala pri la mondpolitiko, sed kiel Esp-istoj niaj legantoj plaĉe vidas eldonon de tiu ĉi konsciencie farita kompilo. Se Italujo siavice provos rebati per

simila presajo, ankaŭ tion ni rigardos kiel tributon al Esp-o kiel mondsocia faktoro.

"Fanalo" (p. 5) ne estas E-a vorto. Ger. Fanal, signal-lumo. Prezo 6 r.k. Kial ne uzi la stel-sistemon?

OFFICIAL HANDBOOK.

City of Stoke-on-Trent: issued by the Corporation to celebrate the 50th anniversary of the merging of the six pottery towns. With 232 pages, weighing 1½ lb., this book is a magnificent production, giving complete coverage of the industrial, social and cultural life in this area. The photographic section on pottery is beautifully illustrated in color. The Lord Mayor's foreword is given in five languages, including Esperanto—the use of which in this sterling publication underlines the progressiveness and initiative of those responsible for it.

NUR DISTRE!

Paĝindikiloj postlasitaj en libroj redonitaj al iu biblioteko inkludis kvinpundan monpaperon, lardpecon, amleterojn, okulvitrojn, tondilon . . .

Dumviva lutenanto: Ed. Luff loĝis 102 jarojn en la sama domo (Somerset), kie li naskiĝis kaj mortis.

La tomato botanike estas frukto, simila lau strukturo al groŝo. Ĝi estas vegetaĵo nur en la senco, ke ĝi estas nek animala nek minerala.

La plej facile legebla estas: nigra inko sur flava papero; sekvas verda sur blanka; blua sur blanka. La plej malbona kombino estas ruĝa sur verda.

Sveda filologo: La Franca estas la plej rapide parolebla lingvo en la mondo—350 silaboj en ĉiu minuto. Due venas la Japana (310); Germana (250); Itala (230); Angla (220).

Kiu estis la plej granda insulo en la mondo antaŭ ol Aŭstralio estis eltrovita?—Aŭstralio.

Rusaj lingvistoj diras, ke la Samojeda lingvo estas la plej malfacila kaj komplikita en la mondo. Ĝis nun oni ne povas kompili gramatikon de ĝi, tial ĉar ĉiu verbo havas sian propran konjugacion!

★ ★ ★
ANTIDISESTABLISHMENTARIANISM. La plej longa vorto en la Angla. Kiel traduki ĝin?

Jen la literoj de la Angla alfabeto laŭ ilia uz-ofteco.

E T A O N I S H R D L C U F
M P B W G Y V K X Q J Z Ĉu iu povus informi pri tia ordo de la Esp-a alfabeto?

★ ★ ★
Pri privataj bibliotekoj kaj arĥivoj de E-istoj. "Estas domage perdi librojn kaj aliajn valorojn de mortintaj sam-oj. Tiuj objektoj povus esti ne nur utilaj en si mem, sed estus ofte serĉataj de aliaj E-istoj. Homoj posedantaj librojn kaj dokumentojn anoncu tion al iu kompetentulo, ekz. del. de UEA, kiu povus pretigi kun la koncerna s-ano liston kaj tiel konservi librojn ĉu por kluboj, societoj, rondoj, ĉu por interese-muloj-unuopuloj."—Jaromir Rebiček.

★ ★ ★
Se la tutmonda loĝantaro ensaltus en la Lagon de Konstanco, tio plialten levus la akvonivelon nur 15 centimetrojn.

★ ★ ★
En 1954j. meznombro 40 elcentoj de Francaj domoj ne havis instalitan akvoviziton. (20 elcentoj en urboj de pli ol 50 mil loĝantoj, kaj 65 elc. en la kamparaj komunumoj.

—"Cite Nouvelle."

★ ★ ★
"Dana Antologio" en Esperanto eldoniĝos kun subvencio de la Dana registaro. Tio "plaĉos" al Prof-o Blinkenberg!

★ ★ ★
S-ro David Kennedy (Glasgovo) jam 37 E-Mondkongresojn vizitis.

★ ★ ★
En Jugoslavio E-o estas instruata en 127 lernejoj kun preskaŭ 4000 lernantoj. En Polujo 360 instruistoj kompetentas pri E-o.

★ ★ ★
"(La Dekan Libron de la Odiseado Homera) mi komencis traduki du horojn post mia unua lernpaŝo en Esperanton. Mi finis ĝin, farinte nur malmultajn erarojn, en malpli ol monato. Per tio vi vidas, kiel facile kaj rapide homo povas akiri praktikan scion de tiu alloga lingvo": Giles Dixey (1933) en antaŭparolo al la eldonaĵo. (Lia malmatureco mon-

triĝas en la verko mem. Cetere, kio fariĝis pri tiu memfidulo? Trofrue "florinta", li ŝajne forvelkis.

PROBLEMOJ PRI VARBADO.

Moderna Homo kaj la Movado Esperanta.

Sociaj Faktoroj Malfaciligas Taskon de Informado.

La problemoj, kiel varbi homojn al E-o, estas tia sama, kiu konfrontas ĉiujn idealismajn movadojn. Ne nur temas pri junuloj; ankaŭ temas pri homoj ĉiuagaj. Ĉe ili la libera tempo ĉiam pli etiĝas, ĉar ili estas pli kaj pli okupataj, luktante kun la "alta viv-nivelo"—kio estas, ŝajne, plenigado de hejmoj per elektraĵoj kaj similaj aparatoj. Tio devigas ilin labori en du oficoj—la ĉiutaga regula, kaj ia profitdona flankokupo.

Povas esti, ke ankaŭ la edzino sin lasas dungigi, kio enspezigas tri salajrojn, necesajn por pagi la ŝuldojn aŭ havigi al ili ankoraŭ da dezirataj objektoj. Ofte viroj tial laboras konsiderinde pli ol la 40 horojn fiksitajn perleĝe kiel maksimumon.

Se sufiĉe bonŝancaj, ili povas rabi la horojn, por gapi al pene akirita televido. Rezulto: malmulta legado, ekster efemeraj revuoj, mizera societa vivo, kadukiĝo de kulturaj valoroj... fine pensa, spirita marasmo.

Krome, la batalo por atingi prestiĝan starlokon en nia teknika socio, nome, bontonan oficon kun konforme alta salajro, devigas junulojn enŝuti ĉiajn fortojn en fake specialan studon. Tio, kune kun la supre menciitaj faktoroj, nepre indikas ĉiamkreskantan malfacilon, varbi homojn al E-o, studobjekto, kiu ofte aspektas al ili diletanta, flankokupa ludilo, ĉar mankas al ĝi la pelforto de tuja neceso kaj urĝeco.

Tamen restas fekunda kampo. E-o daŭre logas precipe tri temperamentojn. (a) la racie-pensantan, kiu prudente vidas en ĝi praktikan solvon al la lingvo problemoj, kaj instrumenton tre utilan, eĉ profitan, inter difnita kadro; (b) la idealisman, aŭ homarisman, kiu sentas en la lingvo kaj ties celo la motivan noblecon, kaj serĉas pens-interŝanĝon en fratama komprenado; (c) la lingvoamantan kaj literaturulon, kiu amas en E-o la genion de ĝia mirinda formstrukturo kaj egalpezigitan internaciecon de ĝia vortaro kaj sintakso; kaj perceptas

ĝian espriman potencon kaj flekseblecon, kiuj indikas novajn vojojn al spirita aventurado.

En landoj kie la vivritmo kaj socia strukturo povas nesame efiki ol ĉe ni—ekz. en Jugoslavio, Estonio, Suomio—E-aj kursoj estas bone alestataj. Ankaŭ en Japanujo kaj Brazilo, religiaj kaj metafizikaj rondoj favoras E-on, kaj tie kaj aliloke komunumaj aŭtoritatoj eksperimentas kun ĝi.

Sub evidenta malavantaĝo, la Angleparolantaj E-istoj ankoraŭ havas multon por fari. La aĝo meza de anoj de la Brita E-Asocio estas 50-60 jara. Se la miloj da neorganizitaj E-istoj en Britujo grande aliĝus al sia landa centro, tiu statistiko montrus pli da sano. Senaliĝaj E-istoj rabas de nia afero tiun imprescon, kiun donus al ĝi ilia grandskala membriĝo; ili forigis la embarason sentatan de niaj gvidantoj, kiam tiuj estas petataj doni statistikon pri anoj. Nur per nova sango nia movado trovas energion — por sin movi.

Simile en Usono, la fideluloj laboras sub la ombro de ĉion-manganta idiomio, medio de vasta kulturo. Simile en Aŭstralio, kie multaj E-istoj izolas ekster la A.E.A. Ilia anigo donus al nia asocio la potencon influi rondojn, kies aprobo de E-o estas tre dezirinda.

La homo devas mastri la malfacilojn, kiuj nun venenas lian vivmedion. Li, kiu nun sendas siajn satelitojn por ĉirkladi kun la astroj de l'ĉielo, ankoraŭ ne libere parolas kun siaj kunhomoj de aliaj lingvoj. Tamen li povas, se li volus. Venos tempo, kiam ni ne plu estos internacie mutaj. Sed tio dependas de la tempo necesa por ke nia komuna prudento egaligu kun nia mirinda tekniko, kaj nia sana organiza uzado de nia malgranda tero iru sampaŝe kun niaj venkoj super la spaco.—F.R.B.

Al M.C.—". . . named after Lincoln"? P. 316 Orig. Verkaro: "Sian nomon la hilelismo ricevis laŭ la nomo de . . . Hillel". La Germana kaj la Franca similas la Anglan uzadon: "Er nannte das Kind nach seinem Oheim" (. . . laŭ ĝia onklo); "D'après vous cela signifie que . . ." (Laŭ vi tio signifas ke . . .). Ŝajnas do, ke "laŭ" tiusence uzata estas iom tre internacia.